



# KONFERENCA LIBRO

**Konferenca temo:**

***La pedagogio de Esperanto  
antaŭ la defioj  
de interkultura komunikado***

**Krakovo, 2009**

*Konferenclibro de la 42-a ILEI-konferenco*

**Redakta komitato:**

Aida Čižikaitė, Malgosia Komarnicka, Ilona Koutny,  
Josip Pleadin

**Ĉefa redaktoro:**

Małgosia Komarnicka

**Redaktoro de la Simpozia parto:**

Ilona Koutny

**Teknika redaktoro:**

Josip Pleadin

**Grafika kaj teknika aranĝo:**

“Grafokom”, Đurđevac, Kroatio

**Presis:**

Pola Esperanto - Asocio Filio en Łódź - Robert Kamiński

# *Antaŭaj konferencoj*

## **Listo de ILEI-Konferencoj ekde 1976**

10-a	1976	San Marino
11-a	1977	Luksemburgo
12-a	1978	Gorizia (Italio)
13-a	1979	Locarno (Svisio)
14-a	1980	Cottonera (Malto)
15-a	1981	Gödöllő (Hungario)
16-a	1982	Seiano (Italio)
17-a	1983	Ŝintra (Portugalio)
18-a	1984	Ŝkofja Loka (Jugoslavio)
19-a	1985	Kungälv (Svedio)
20-a	1986	Louvain-la-Neuve (Belgio)
21-a	1987	Łódź (Pollando)
22-a	1988	Kerkrade (Nederlando)
23-a	1989	Carleon (Britio)
24-a	1990	Hanabanillas (Kubo)
25-a	1991	Voss (Norvegio)
26-a	1992	Bratislava (Ĉeĥoslovakio)
27-a	1993	La Paterna (Hispanio)
28-a	1994	Kangnam (Koreio)
29-a	1995	Övik (Finnlando)
30-a	1996	Tibor (Ĉeĥio)
31-a	1997	Lara (Aŭstralio)
32-a	1998	Montpellier (Francio)
33-a	1999	Karlovy Vary (Ĉeĥio)
34-a	2000	Bouresse (Francio)
35-a	2001	Lovran (Kroatio)
	2002	Ne okazis
36-a	2003	Örestrand (Svedio)
37-a	2004	Bratislava (Slovakio)
38-a	2005	Kaunas (Litovio)
39-a	2006	Parma (Italio)
40-a	2007	Ranzan (Japanio)
41-a	2008	Portonovo (Benino)
42-a	2009	Kraków (Pollando)

## *La Alta Protektanto*

---



**s-rino Katarzyna Hall**  
**la ministro de la Nacia Klerigado de Pollando**



(Ĝis la finredakto de la Konferenca libro  
ni ne ricevis salutvorton de s-rino Hall)





**s-ro Marek Nawara**  
**marŝalo de la Malgrandpola Vojevodio**



Województwo  
**Małopolskie**

# Anstataŭanto de la Alta Protektanto



## s-ro Roman Ciepela vicmarŝalo de la Malgrandpola Vojevodio

Estimataj gesinjoroj.

Elkore mi salutas en Krakovo, la ĉefurbo de Malgrandpola Vojevodio, ĉiujn gepartoprenantojn de la 42-a Internacia Konferenco de Esperanto-Instruistoj. Mia saluto estas des pli kora, ĉar la honoran patronecon transprenis la Marŝalo de la Malgrandpola Vojevodio.

La 42-a Internacia Konferenco de Esperanto-Instruistoj estos certe grava evento, ĉar ĝi okazas en la jaro de la festado de la 150-a naskiĝdatreveno de la Kreinto de la lingvo Esperanto - Doktoro Ludoviko Zamenhof. Pro tio mi ĝojas, ke por la loko de la organizata Konferenco estis elektita ĝuste Krakovo, kaj mi deziras al ĝiaj organizantoj kaj partoprenantoj, ke ĝi plenumu la esperojn atendatajn.

Ĝi certe fariĝos grava forumo por ideo-interŝanĝo pri la temoj de pasinto, hodiaŭo kaj estonto de la verko kreita de homo, kies la plej granda revo estis - per forigo de lingva bariero - faciligi al homoj en la tuta mondo la reciprokan komunikadon, por ke, malgraŭ la kulturaj, religiaj kaj mondkonceptaj diferencoj kiuj ilin dividas, uzante la komunan lingvon, ili scipovu starigi kontaktojn kaj per tio ili pli bone ekkonu unu la alian, kaj rezulte el tio - komprenu sin.

Kvankam ekde la momento, kiam la unuaj entuziasmoj komencis lerni Esperanton, pasis pli ol cent jaroj, kaj la mondo travivis eksterordinaran evoluperiodon en sia historio, kies rezulto estis la aperado de ĉiam pli modernaj komunikaj teknologioj, la ideo de Ludoviko Zamenhof, faciligi al la homaro la reciprokan komunikadon, restas senĉese aktuala.

Pro tio, gesinjoroj, mi ankoraŭfoje salutante vin ĉiujn, venintajn al Krakovo por la 42-a Internacia Konferenco de Esperanto-Instruistoj, deziras fruktodonan diskutadon kaj plian evoluon de Esperanto kiel ilo por interkompreniĝo de homoj el ĉiuj partoj de la mondo.



# *Honora patrono de la Konferenco*



## **Prof. d-ro habil. inż. Włodzimierz Roszczyniański Rektoro de la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo**

Estimataj Gesinjoroj,

Estas granda honoro por mi gastigi Vin en la muroj de Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo. Ĉi tiu nepublika alternejo ekzistanta ekde 15 jaroj instruas nuntempe 7 mil da studentoj, en jenaj fakultatoj: Sociologio, Informadiko, Financoj kaj kontoscienco, Direktado.

Kun ĝojo kaj plezuro mi bonvenigas la partoprenantojn de la Esperanto-Konferenco, kun des pli granda - ĉar en 1963-a jaro, kiel junulo, mi partoprenis Internacian Esperanto-Kongreson en Gyula. Tiu ununura, bedaŭrinde, kontakto kun tiu lingvo lernigis al mi grandan respekton kaj admiron por Vi, kiuj en universala mondo, trovas ĝojon pro renkontiĝoj en spirito de Zamenhof.

Mi deziras al Vi agrablan restadon en nia lernejo kaj fruktodonajn debatojn.

# Honora patrono de la Konferenco



## **Prof. d-ro habil. Paweł Kruszewski** **Rektoro de la Altlernejo Paweł Włodkowic en Płock**

Estimataj Gesinjoroj,

Mi kore bonvenas vin al Krakovo, al la internacia Konferenco de Esperantistaj Instruistoj. La lernejo, kiun mi gvidas, la Altlernejo en Płock, kiu estas unu el la honoraj patronoj de tiu Konferenco, havas la nomon de Paweł Włodkowic, pola sciencisto kaj registarano ĉe la fino de la 14-a kaj komence de la 15-a jarcento. Li estis ligita al Płock per sia naskiĝloko kaj kun Krakovo per la scienca kaj ŝtata agado. Tiam li estis rektoro de la krakova Jagelona Universitato kaj la reĝa delegito en la Koncilio de Konstanco en 1414. Ĝuste tie li prezentis, en la nomo de Pollando, la koncepton ke ĉiuj nacioj, inkluzive paganaj, havas la rajton decidi pri la propra ento kaj vivi pace sur la teritorioj, kiuj estas ilia proprieto. Tiel li kreis la bazon por fundamentaj principoj de la nuntempa internacia leĝaro kaj la rajtoj de la popoloj.

La temaro de la konferenco kaj de la simpozio organizata kadre de ĝi, rilatas al tiuj principoj. Respekto por naciaj, sociaj, religiaj aŭ kulturaj diversecoj de specifaj civitoj, certigo de ĉiuj kondiĉoj por ilia disvolviĝo kadre de paca kunekzistado, estos ja ankaŭ la temo de niaj sciencaj kaj esploraj serĉoj.

Mi deziras al la partoprenantoj de la Konferenco, ke la idealoj, kiuj lumis al Paweł Włodkowic, estu modelo kaj motivigo por agado al vi ĉiuj. Mi deziras ke ili estu por vi la vojmontrilo por trovi tion kio estas bela, bona kaj vera en la mondo. Al tiuj idealoj servas ankaŭ la lingvo Esperanto, la plej disvastigita internacia lingvo.


## *Honora patrono de la Konferenco*

---



**Prof. d-ro habil.  
Michał Śliwa**  
**Rektoro de la Pedagogia Univeristato en Krakovo**

(Ĝis la finredakto de la Konferenca libro  
ni ne ricevis salutvorton de s-ro Śliwa)



**Probal Dasgupta**  
prezidanto  
de UEA



Estimataj konferencanoj,

Mi, en mia propra nomo kaj en tiu de Universala Esperanto-Asocio, salutas vin, kiuj partoprenas la 42an Konferencon de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - konferencon jubilean, ĉar ĉi-jare via Ligo trafas sian sesdekjarigon. Pro tiu jubileo ni en la Asocio esprimas al vi niajn plej sincerajn gratulojn kaj bondezirojn. De longe ni en la Esperanta movado kutimas al la kunvivado de la "ordinara" lingvouzado kun la specife pedagogia aliro. Ni scias, ke en iu ajn aranĝo ofte troviĝas komencantoj. Foje ni faras apartan fortostreĉon por doni al ili senton de inkluzivateco. Foje ni specife ignoras ilin, por ke ili vidu senpere la gloron de la altnivela uzado de serioza, senkompromisa Esperanto. Ambaŭ stiloj signas ian reagon al la ĉeesto de la komencantoj - reagon bazitan sur pedagogia

sinteno. Tamen, ni emas limigi la pedagogian etoson al la instruado de la Esperanta lingvo (foje ankaŭ de ĝia literaturo). Kun jam sufiĉe riĉa kultura kaj socia historio, Esperanto fariĝis studobjekto kaj komprenobjekto, kiu meritas pli da seriozeco ankaŭ en la nacilingvaj medioj, en kiuj ni vivas. Kiam la esperantistoj en tiuj landoj, kie la uzado de la nacia lingvo ankaŭ inter esperantistoj ne estas tabua, sialingve interkomunikiĝas parole aŭ per revuaj artikoloj, ili malofte interŝanĝas pedagogie elektitajn, konscie malnaivajn vortojn antaŭ la komencantoj, kiuj ne konas aŭ malmulte konas la historion de nia kulturo. Ni malofte parolas aŭ skribas tiamaniere, ke niaj komunikaĵoj kaj sintenoj facile kaj kiel eble plej senĝene inicu la novajn homojn en la specifajn komprenojn, kiujn al ni liveris nia spertobazo en Esperantujo. Unu el niaj taskoj, kiel instruistoj ne nur de Esperanto sed ankaŭ esperantistaj, estas la starigo de diversnivela dokumenta bazo pri la Esperanta kulturo en la naciaj lingvoj. Tia bazon oni parte kreis, sed ĉefe sur la supera nivelo de esploroj kaj studoj. Admirindan laboron sur tiu tereno oni faris en iuj naciaj lingvoj. Sed tia laboro devas esti aparte farata en ĉiu lando surbaze de la lokaj kunteksto kaj historiaj apartecoj. Ŝajnas al mi, ke ju pli ni laboros por rigardi eksteren kaj instrui pri Esperanto ankaŭ en la naciaj lingvoj, des pli ni sukcesos fortikigi la pedagogian bazon de tio, kion ni proponas ne nur al la komencantoj, sed ankaŭ al la progresintoj. Ofte la lingvaj progresintoj estas kulturaj komencantoj, kiuj volonte uzus nacilingvajn tekstojn por pli bone konatiĝi kun la Esperanta kulturo dum ili pli bone lernas la lingvon. Prezertante ĉi tiun personan opinionon, mi iom transiris la limojn de formala salutado en la nomo de fratina Asocio, kaj mi finas do per pardonpeto, kaj per danko pro via indulgemo rilate tiun mian eksceson.

Amikajn salutojn kaj bondezirojn de

Probal

## Dr. Reinhard Fössmeier senata sekretario de AIS

Nome de AIS, la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, mi gratulas al ILEI pro ĝiaj 60-jara ekzisto kaj agado kaj deziras ĉion bonan por ĝia 42a Konferenco en Krakovo. La agado de ILEI kreas nepran antaŭkondiĉon por tiu de AIS: Ja ambaŭ "instruas Esperante", sed dum AIS instruas nur per Esperanto, ILEI instruas ankaŭ la lingvon mem, nepre necesan por, ekzemple, studo ĉe AIS. Mi esperas, ke la paraleleco de la ILEI konferenco kaj de AIS studadsesio ebligos al la du organizaĵoj viglan interŝanĝon de spertoj.



## Halina Komar prezidanto de Pola Esperanto-Asocio

Karaj Gesamideanoj ILEI-anoj!

Nome de Ĉefa Estraro de Pola Esperanto Asocio mi salutas vin kaj deziras sukcesan konferencon! Ni ĉiuj komprenas la gravecon de via agado. Sen ĝi ne eblus disvolviĝo de la Esperanto-movado, en kiu konstante mankas instruistaro. Vi do estas nia ESPERO por pligrandigi kaj plivalorigi la fakan socion de E-instruistoj. Dum la konferenco havu la tempon por krei gravajn al la tuta movado programojn, celantajn la multobligon de la instruistoj kaj plialtigon de iliaj kvalitoj! Interkonsentu la internacian kunlaboron, organizu partnerajn laborgrupojn! Tio permesos al vi uzi ankaŭ la publikajn monrimedojn de la eŭropaj edukaj projektoj por niaj noblaj celoj, valoraj por la tuta homaro... La plej bonajn ideojn, programojn, decidojn kaj gajan amikecan etoson dum via semajna restado en Krakovo, al ĉiuj partoprenantoj de ILEI- Kongreso deziras

Halina Komar, prezidantino de PEA



## Radojica Petrović prezidanto de ILEI

Karaj konferencanoj,

Bonvenon en Krakovo, urbo de riĉa historia heredaĵo kaj fonto de inspiroj por novaj streboj kaj agado. Mi dankas al la gastigantoj kaj organizantoj de la 42-a konferenco de ILEI pro la certigitaj bonaj kondiĉoj por la konferenca laboro. Mi bonvenigas la konferencajn gastojn kun kiuj ni deziras dividi niajn spertojn kaj esperojn pri la pedagogia laboro por kaj per Esperanto.

En ĉi tiu jaro ILEI notas sian 60-jariĝon koincide kun la 150-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, kiun ni omaĝas per nia konferenco en lia naskiĝlando. Samaĝa kun ILEI estas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. La koincido de la datrevenoj havas ne nur simbolan signifon. Ĝi difinas la kadron de la konferenca temo La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado. La temo ne estas nova, sed la defioj estas ĉiam pli fortaj.

Orientiĝo al interkultura kaj translingva komunikado kiel esenca motivo por ekesto de Esperanto, kialo por ĝia lernado kaj ĉeffaktoro de ĝia daŭropova ekzisto karakterizis la instruadon de Esperanto ekde ĝia apero. Ĝi sekvas el la esenco de la esperantismo difinita per la Deklaracio pri Esperantismo (Bulonja Deklaracio, 1905), laŭ kiu la celoj de disvastigado de Esperanto estas:

- doni al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si,
- servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj
- ebligi publikigadon de tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Alia celo de la esperantismo, ne vortigita eksplicite en la Bulonja Deklaracio sed karakterizanta la Esperanto-agadon ĉiam pli forte en la lastaj jardekoj, estas konservado de la lingva diverseco kaj protektado de lingvaj kaj kulturaj rajtoj. La Praga Manifesto (1996) asertas avantaĝojn de transnacia edukado per Esperanto en la senco de malfermaj perspektivoj, pedagogia efikeco kaj justeco, kaj konkludas:

Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciantaj projektoj de la homa emancipiĝo – projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homa komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Kun tiuj celoj IELI renkontas siajn defiojn de interkultura edukado por kaj per Esperanto. Kun tiaj ideoj ni konferencas ĉi jare en la naskiĝlando de Zamenhof por kontribui nian ŝtonon al konstruo de la paca ponto inter la popoloj.

Mi deziras al la partoprenantoj kaj gastigantoj bonan laboron kaj agrablan konferencan semajnon en la rava Krakovo.





### Gregor Hinker Prezidanto de TEJO

Dum tiu ĉi semajno okazas samtempe en Krakovo la 42a konferenco de ILEI kaj en Liberec la 65a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO. Niaj aktivecfokusoĵoj – instruado je unu flanko, kreado kaj flegado de internacia junulara laboro je la alia – estas tiom evidente reciproke ligitaj, ke malfacilas diri kiu estas la ovo kaj kiu la kokino. Aparte menciindas ke per la serio de seminarietoj *Flugiloj de malfacilaj ventoj* dum kiuj junuloj akiras bazajn instru-kompetentojn ILEI jam de jaroj altvalore kontribuas al niaj junularaj renkontiĝoj.

Nome de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, mi deziras al vi sukcesan kaj agrablan konferencon.



# Salutvortoj

Karaj Geamikoj – Esperantistaj Instruistoj

Ni kore bonvenigas Vin en Krakovo – la plej bela el polaj urboj. Estas por ni granda honoro gastigi Vin ĉi tie, kie troviĝas la sidejo de la Pola Sekcio de ILEI, en la jubilea jaro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Eminentaj patronoj de nia konferenco rememorigas kreskantan prestiĝon de Esperanto. Via valora partopreno en la konferenco donas plian impulson al la evoluo de la Internacia Lingvo kaj al ĝia disvastiĝo.

Nia urbo havas riĉan tradicion de Esperanto-movado. Du Universalaj Kongresoj kaj aliaj gravaj aranĝoj estis sukcese organizitaj ĉi tie. La 42-a Konferenco de ILEI daŭrigas tiun belan tradicion kaj malfermas novajn perspektivojn ne nur por la krakova E-movado.

Dum multaj monatoj ni fervore zorgis pri preparado de Via kiel eble plej bona restado en Krakovo. Ni esperas, ke Vi memoros kun granda plezuro Vian partoprenon en la 42-a ILEI-Konferenco kaj ke Vi gardos la plej bonan rememoron el nia urbo kaj el la provinco Małopolska. Ni dankas, ke Vi fidis al ni kaj alvenis al Krakovo.

Laŭ la devizo „ILEI-Konferenco – ambaŭ: amuzo kaj scienco” ni deziras al Vi agrablan restadon en nia urbo kaj fruktodonan konferencon!

**Piotr Nosek**

prezidanto de ILEI-Pola Sekcio, membro de LKK

**Małgosia (Małgorzata J.) Komarnicka**

sekretario de ILEI-Pola Sekcio, prezidanto de LKK


**Magdalena Tatara**

kasisto de ILEI-Pola Sekcio, membro de LKK



La 3-an de junio 2007 estis kreita la asocio Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI-Pollando surbaze de la de dek jarojn aganta Pola Sekcio de ILEI. La Asocio estas samtempe sekcio de ILEI internacia. Retadreso de la Estraro de ILEI-PL: [estraro@ilei.pl](mailto:estraro@ilei.pl) Retpaĝo de la ILEI-PL: [www.ilei.pl](http://www.ilei.pl)

## *La Estraro de ILEI*



Radojica Petrovic  
Prezidanto  
Kunordigado, eksteraj rilatoj,  
la projekto Interkulturo



Zsafia Korody  
Vicprezidanto  
E-centroj, ekzamenoj,  
instrukapablado



Atilio Orellana Rojas  
Sekretario de ILEI



Sjoerd Bosga  
Kasisto de ILEI



Yas Kawamura  
Azia agado



Aida Čižikaitė  
Konferencoj,  
sciencia agado



Mihai Trifoi  
Lerneja agado


# *Loka konferenca komitato*

## *Prezidanto*



**Malgosia  
KOMARNICKA**  
(informado kaj surlokaj  
kontaktoj, loĝiga servo,  
konferenceto)

## *Vicprezidanto*



**Lidia  
LIGEZA**  
(konsultanto, tradukanto,  
kontaktoj kun aŭtoritatoj)

## *Kasisto*



**Magdalena  
TATARA**  
(financoj kaj invitletoj)

## *Membro*



**Piotr  
NOSEK**  
(ekskursa servo)

## *Membro*



**Adam  
LOMNICKI**  
(tradukanto, kontaktoj kun  
aŭtoritatoj)

## *Membro*



**Josip  
PLEADIN**  
(konferenca libro,  
informado kaj fotado)

## *Membro*



**Malgorzata  
NITKOWSKA**  
(vesperaj programoj)

# Pollando



Pollando – situata en la koro de Eŭropo, kun 38 milionoj de loĝantoj kaj la areo de 312.000 km<sup>2</sup>, estas la sepa plej granda lando en la kontinento laŭ la areo kaj la sesa laŭ la loĝantaro. Pro tiuj rilatoj Pollando povus esti konsiderata kiel averaĝa kaj kutima, sed pro multaj aliaj, ĝi estas vere escepta lando...

Por multaj esperantistoj Pollando okupas specialan pozicion en la mapo de la mondo, dank' al doktoro Zamenhof – la kreinto de Esperanto. Sed ankaŭ multaj aliaj trovas Pollandon escepta loko kaj venas ĉi tien kiel pilgrimantoj al sanktejoj. Ŝatantoj de virga naturo trovas belajn lagojn, montarojn kaj praarbarojn plenajn de sovaĝaj bestoj. En Pollando oni povas observi 220 speciojn da birdoj, i.a. cikoniojn, kies nombro estas la plej granda en Eŭropo. Cikonio estas pola nacia birdo, kiu neoficiale zorgas pri la naskiĝkvanto. Lupoj, ursoj, uroj, linkoj, alkoj, ĉamoj, vulpoj ne estas raraj. Ŝatantoj de belaj urboj kun ĉarma atmosfero venas al Krakovo aŭ al aliaj historiaj urboj por ĝui la mistikajn centrojn. Ŝatantoj de bonaj trinkaĵoj sendube aprecos la polan tradicion, kaj certe ankaŭ ŝatantoj de belaj virinoj admiros la belecon de polinoj. Homoj kiuj preferas pli spiritajn sentojn trovos multegajn sanktejojn multnombre vizitatajn de pilgrimantoj. Por ŝatantoj de arabaj ĉevaloj, la mond fama urbeto Janów Podlaski estas ilia Mekao. Simple, Pollando estas por ĉiuj.

Dum pli ol mil jaroj de la pola ŝtateco, nia lando akceptis multajn influojn el ĉiuj partoj de Eŭropo, tial poloj estas eŭropanoj en la plej larĝa senco... Pollando estis la ponto kaj la lumturo por ambaŭ orientaj kaj okcidentaj nacioj. Dum jarcentoj kune kun poloj vivis en unu ŝtato judoj, germanoj, litovoj, armenoj, tataroj, ciganoj,

# Pollando

italoj kaj multaj aliaj, kreante multkulturan kaj multlingvan socion. Eĉ multaj el niaj reĝoj estis eksterlandanoj, kiuj ofte ne parolis la polan!

En Pollando multfoje aperadis neinvititaj gastoj, kiuj tro ĵaluze amis nian landon kaj volis ekposedi ĝin komplete. Dum maltrankvilaj tempoj milionoj de poloj elmigradis kaj vivis eksterlande en ĉiuj kontinentoj. Multaj ne revenis al la patrujo kaj eĉ nuntempaj poloj ofte elmigras, dank' al kio en multaj landoj oni povas komunikiĝi en la pola kiel en internacia lingvo! Bedaŭrinde la pola estas malfacila eĉ kiel patrolingvo. Nemirinde, ke Zamenhof kreis Esperanton ĉi tie...

Pollando estas situata en la ĉiam ŝanĝiĝanta najbareco. Antaŭ dudek jaroj ni havis tri najbarajn ŝtatojn: Germana Demokratia Respubliko, Ĉeĥoslovakio kaj Sovetunio. Ĝis nun restis neniu el tiuj landoj! Hodiaŭ ni havas tute novajn najbarojn: Federacia Respubliko Germanio, Ĉeĥio, Slovakio, Ukrainio, Belorusio, Litovio kaj Rusio. Sed antaŭ jarcentoj niaj najbaroj estis ankoraŭ pli multaj kaj pli ekzotikaj, kiel Turkio. Hodiaŭ ne tro granda, sed iam Pollando estis la plej granda ŝtato en Eŭropo.

Pollando donis al la mondo kelkajn gravajn personojn, konatajn en ĉiuj anguletoj de la mondo. La plej famaj estis Koperniko, Ŝopeno kaj la papo Johano Paŭlo la 2a, sed la listo estas multe pli longa, inkluzive kelkajn Nobel-premiitojn. Filmamantoj aprecas verkojn de Andrzej Wajda, Roman Polański kaj Krzysztof Kieślowski, kies filmoj gravas en la historio de la monda kino. Hazarde? Verŝajne ne, ĉar Pollando inspiras!

Nia lando ofte surprizas vojaĝantojn per nekutimaj tradicioj, nemalkovritaj allogaĵoj kaj iam neantaŭvideblaj, sed ĉiam gastamaj loĝantoj. Valoras viziti tiun landon, en kiu kontrastoj pace kunekzistas.

Dum la konferenco okazos prelegoj pri Pollando je diversaj interesaj temoj. La prelegantoj estos Małgosia J. Komarnicka kaj Piotr Nosek, estraranoj de ILEI-Pollando. Dum la prelegoj estas antaŭvidataj diversaj gastoj. La temoj de la prelegoj estas stimulantaj:

1. Pollando kian vi ne konas
2. Krakovo, la konferenca urbo – klaĉoj kaj legendoj
3. Mallonge pri longa historio de Pollando
4. Tio, kion vi volas scii, sed vi hontas demandi
5. Polaj gustoj (bongustaĵoj) kaj tradicioj
6. Pollando per okuloj de eksterlandano

**Bonvenon!**

Krakovo estas la plej fama urbo de Pollando kaj unu el la plej gravaj kulturaj urboj de meza Eŭropo. Ĝi estas situata en la sudo de Pollando en la supra fluo de Vistulo.

Ĝis la jaro 1609 Karkovo estis ĉefurbo de Pollando kaj nuntempe estas la ĉefurbo de provinco Małopolska.

La koro de la urbo estas la urbocentro, la plej granda mezepoka placo de Eŭropo. Samkiel antaŭ jarcentoj, en ĉi tiu loko koncentriĝas kultura, komerca kaj socia vivo de Krakovo. Ĝi estas ŝatata loko por pentristoj, muzikistoj kaj kolomboj. Preskaŭ en ĉiuj antikvaj brik- kaj ŝtondomoj estas kafejoj, restoracioj, galerioj, muzeoj kaj vendejoj. La urbocentro estas listigita en la Monda Heredaĵo de Unesko.

Meze de la Ĉefpaco staras la antikva flava Draphalo, en kiu same kiel en la 13-a jarcento ekzistas butikoj kun memoraĵoj: popolaj artekoj kaj sukkena juvelaro. Sur la etaĝo de Draphaloj troviĝas galerio de la pola pentroarto de la 19-a jc., nuntempe ĝi estas translokigita al la reĝa kastelo en Niepołomice.

La plej granda konstruaĵo de la Ĉefplaco estas Sankta-Maria Preĝejo. La okcidenta flanko de la preĝeja turo estis la urba gardoturo. Dum ĉiu plena horo de ĝiaj fenestroj fluas trumpetsignalo, la muzika simbolo de Krakovo. En la preĝejo, en la ĉefaltarejo troviĝas fama, skulptita el tilia ligno, kolorigita kaj orumita altaro de Vito Stvoso.

Wawel, la reĝa kastelo, estas la plej grava monumento de la krakova historio. Ĝi situas sur la monteto apud Wisła (Vistulo). Tie troviĝas la plej granda kaj la plej valora kolekto de centkelkdek antikvaj gobelinoj. Wawel estas listigita en la Monda Heredaĵo de Unesko.

La Jagelona Universitato, komence La Krakova Akademio estis fondita en la jaro 1364 de la reĝo Kazimiro la Granda

La Teatro al Julio Słowacki estas la plej okulfrapa konstruaĵo ĉe Szpitalna strato. La teatran konstruaĵon oni konstruis en la jaroj 1891-93, en la stilo de pariza Opero.

Pli malnova kaj pli nova centroj de Krakovo ofertas neripeteblan etoson de la ĉiutaga vivo. Amaso da homoj ripozas, interparolas aŭskultante muzikon en kafejoj, bierejoj, restoracioj aŭ vizitas filharmonion, muzeojn, galeriojn, teatrojn, kabaredojn. Sur la Ĉefplaco ne mankas florvendistinoj, kiuj en provizitaj standoj vendas florojn de ĉiu koloro. Multaj doroŝkoj, ĉevala tramo aŭ meleksoj veturigas vizitantojn al belaj kaj interesaj lokoj. Ofte sur la Ĉefplaco okazas diversaj urbaj solenaĵoj kaj festivaloj. Tie aperas budoj kaj bazarstandoj. Ŝatantoj de naturo povos viziti botanikan ĝardenon, Plantejon, kelkajn parkojn aŭ admiru abunde ornamitajn apudkafejajn ĝardenetojn.

En Krakovo estas ankoraŭ unu fascina loko, Kazimierz, la juda kvartalo de Krakovo el la 14-a jarcento. Kazimierz estas la dua en la mondo tiel granda kaj



# Krakovo

valora juda komplekso de antikvaj monumentoj. Ĉi tie estas sinagogoj (inter kiuj la plej malnova el la 15-a jarcento), malgrandaj dometoj kaj juda tombejo.

Krakovo estas urbo por ĉiuj. Por ĉies aĝo kaj plaĉo ĝi posedas konvenajn allogojn. Valoras profiti de ili por kontentigi menson kaj sensojn.

En Krakovo en 1912 kaj 1931 okazis du Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj en 1987 la Internacia Junulara Kongreso de TEJO kaj Krakova Societo Esperanto ekde 25 jaroj organizas la aranĝon “Esperantaj Tagoj de Krakovo”. Inter la 13-a kaj 18-a de julio 2008 okazis en Krakovo la 16-a IMEK (Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso).

En Krakovo estas sidejo de la pola sekcio de ILEI.

---

*doroŝko* - malpeza urba ĉevala veturilo, aperinta meze de la 19-a jarcento. Nuntempe turisma atrakcio.

*melekso* - elektra senpolua automobilsimila veturilo por urba trafiko.





# Ĝeneralaj informoj

## **Vetero en Krakovo**

La averaĝa temperaturo en Krakovo en julio estas 23 celsiaj gradoj. Kunporti jaketon por la plej freŝaj noktoj konsilindas.

## **Elektra kurento**

Elektra tensio en Pollando estas 220 V, 50 Hz, kiel en preskaŭ tuta Eŭropo. Ankaŭ la kontaktingoj estas la kutimaj eŭropaj. Tamen se por viaj teknikaĵoj vi uzas alitipajn kontaktilojn konsilindas kunporti adaptilojn.

## **Manĝo kaj akvo**

Eblas antaŭmendi plenan pensionon (matenmanĝo /tagmanĝo /vespermanĝo) je la prezo de 15 € tage, kion ni nepre rekomendas, ĉar aliloke la kostoj estos multe pli altaj kaj apude ne troviĝas aliaj kafejoj aŭ restoracioj. Tiuj, kiuj ne mendis estos priservataj nur post foriro de la tuta grupo. Trinkeblas akvo rekte el la urba akvotubaro, kaj krome, tie kaj ĉi tie en la konferencejo estas trinkakva instalaĵo. Se vi preferas mineralan akvon ĝi estas aĉetebla en duonlitraj boteloj.

## **Retaliro**

Senpaga retaliro disponeblas en la hoteloj Za Kolumnami, Krakowiak kaj Żaczek, sed ne en gastejo Oleandry. En la konferencejo funkcias WiFi retaliro.

## **Kopiado**

En la hotelo Za Kolumnami estas eble fari kopiojn kontraŭ 10 groŝoj por paĝo.

## **Valuto kaj monŝanĝo**

En Pollando oni uzas zlotojn (Zł, internacia kodo - PLN). 1 Zł egalas al 100 groŝoj. La nuna kurzo estas 1 EUR ~ 4,5 PLN. Plej konsilindas preni monon de monaŭtomatoj, kiuj facile troveblas ĉie. Internacie konverteblajn valutojn eblas ŝanĝi en bankoj, monŝanĝejo, grandaj hoteloj. Bonvolu ne ŝanĝi monon en neoficialaj monŝanĝejoj.

## **Sanservoj**

Medicinaj servoj de pluraj landoj havas kontraktojn kun Pollando, surbaze de kiuj eksterlandanoj povas uzi la samajn servojn kiel enlandaj loĝantoj. Bonvolu mem kontroli, ĉu via lando havas tian kontrakton kaj sub kiuj kondiĉoj. Via aliĝo al la konferenco inkluzivas neniun asekuron - bonvolu mem prizorgi asekurpolison.

## **Poŝtaj tarifoj**

Leteroj kaj bildkartoj (ĝis 50 gramoj)

Pollando: 1,55 zloty

Eŭropo (inkl. Cipro, Izraelo kaj Ruslando): 2,40 zloty

Aliaj kontinentoj: 2,50 zloty

# *Ĝeneralaj informoj*

---

## **Telefonado**

Eblas uzi publikan telefonan servon en la hotelo. Uzeblas kaj kartoj, kaj moneroj. La kartojn eblas aĉeti en ĉiu kiosko, vendejo. Telefonkodo de Pollando estas +048, por Krakovo estas 012.

## **Medikamentoj**

Se vi uzas preskribitajn medikamentojn, bonvolu kunporti kuracistan recepton en la latina. Konsilindas ankaŭ havi recepton de la kuracisto, se vi portas medikamentojn trans landlimoj.

## **Sekureco**

Krakovo kaj aliaj urboj de Pollando estas sekuraj, sufiĉas ke oni konduku laŭ principoj de sekureco same, kiel en plejmulto da turismaj lokoj.

## **Kelkaj vortoj pri la edukado en Pollando kaj pri la artikolo de Tomasz Malicki**

Ekde kvin jaroj Pollando, estante la ŝtato de Eŭropa Unio, utiligas la ŝancon de la partopreno en la unia labormerkato - poloj havas la eblecon labori en kelkaj uniaj ŝtatoj. Ĝuste el ĉi tiu fakto kaj pro la ŝanĝoj de la vivo en la 21-a jarcento fluas la bezono de la reformigo de la ĝisnuna edukado en Pollando.

La reformoj, kiuj estis dum la lastaj jaroj planitaj kaj prilaboritaj teorie estas ekde la jaro 2008 enkondukitaj en ĉiuj sferoj de la pola edukado laŭ la etapoj.

En la artikolo estas montrata la ĝisnuna stato de la edukado en Pollando kaj la celoj de la ŝanĝoj. Ĉi tio estas prezentata laŭ la lernojara ŝtupo de la edukado, komence de antaŭlernejoj ĝis altlernejoj.

Oni montras ankaŭ la profesiajn kaj sciencajn titolojn ĝis la scienca titolo - profesoro.

Precize estas priskribita la financado de la edukado en Pollando, laŭ la disdivido de la financaj devoj - inter la ŝtataj instancoj de la aŭtoritata povo kaj la loka - komunuma administrado.

Plue estas montritaj la laŭvicaj eroj de la edukado: antaŭlernejoj, devo de la lernado en elementaj lernejoj kaj en gimnazioj - laŭ la planitaj etapoj. Oni menciis la kriteriojn de la allaso al ĉi lernejoj.

Estas priskribita la taga/semajna horaro - laŭleĝa por instruistoj kaj lernantoj - la ĝisnuna kaj la planata en la reformota edukado.

Interesa estas la nuna kaj la planata sistemo de la kontrolado de la scipovoj kaj kapabloj de lernantoj.

Sekvas la sama temaro pri la mezlerneja sistemo de la pola edukado, kompletigita je la kriterioj de la allaso al mezlernejoj de la diplomitoj de gimnazioj kaj pri la profesiaj titoloj de instruistoj - la devigaj por instruisti en postelementaj lernejoj.

La planitaj reformoj en la pola edukado entenas la ĉefajn aktualajn celojn de ĉi ŝanĝoj: enkondukon de du fremdaj lingvoj, de lernobjekto - "edukado por sekureco" kaj ŝanĝon en la ekzamenigado - enkondukon de eksteraj ekzamenoj ktp.

La projekto de ĉi ŝanĝoj estas realigata helpe de la resursoj de Eŭropa Komisiono. La rezultoj de ĝis nun okazintaj ŝanĝoj estas imponaj - kiel oni vidas el la teksto de T. Malicki.

Je la fino de la artikolo de Tomasz Malicki oni trovas la fontojn de la informoj lokigitaj en la teksto.

# *Historio de Esperanto-movado en Krakovo*

## **Krakovaj E-organizoj**

Fine de majo 1906 oni fondis en Krakovo la unuan Esperantan organizaĵon - Krakova Societo Esperanto (KSE), sub gvido de d-ro Antoni Schudmak (Siudmak). KSE iĝis la plej aktiva kaj grava centro de pola esperantistaro sur la sudpollandaj teritorioj, post la urboj Varsovio, Lodzo kaj Lvovo. Ĉekomence aliĝis al KSE ĉirkaŭ 50 membroj.

La aktiveco de la Krakova esperantistaro efikis sukcesplene en la organiza kaj sociokultura vivo kaj en la porscienca agado, promocianta Esperanton en preskaŭ ĉiuj sferoj de la ĉiutaga vivo.

Fine de septembro 1909 estis fondita en Krakovo nova Esperanta organizaĵo - Studenta Esperanto-Rondo en Krakova Komerca Akademio sub gvidado de Albin Kawaler.

En oktobro 1910 estis fondita Akademia Esperanto-Societo funkcianta en Jagelona Universitato, kies prezidanto estis Juliusz Kriss kaj la universitata protektanto - prof. d-ro Odo Bujwid.

Dum oktobro 1924 estis kreita nova E-organizo: Pola Esperanto-Klubo, kiel sendependa organizaĵo asociiganta la krakovan intelektularon. Ĝia prezidanto estis inĝ. Eugeniusz Tor, direktoro de Industria Muzeo en Krakovo.

Fine de la jaro 1928 funkciis en Krakovo jenaj E-organizaĵoj: Krakova Societo Esperanto (1906), Akademia Esperanto-Rondo (1910) ĉe Jagelona Universitato, Pola Esperanto-Klubo (1924), Pollanda Esperanto-Delegitaro (PED) (1926), Sekcio de Esperantistoj-Fervojistoj, Redakcio de la revuo "Pola Esperantisto".

En oktobro 1929 oni fondis Skoltan Esperanto-Rondon, kies prezidantino estis Maria Kazanowiczówna.

La 13-an de majo 1930 estis fondita Pola Esperanto-Instituto; nome de Ministerio de Publika Edukado konfirmis tion oficiale la vojevodo de Krakovo. La unua prezidanto de PEI estis inĝ. Edward Kostecki.

Fine de la jaro 1937 funkciis en Krakovo jenaj E-organizaĵoj kaj institucioj: Komitato kaj Honora Membro de Internacia Esperanto-Ligo - prof. d-ro Odo Bujwid, membroj de Lingva Komitato - Akademio de Esperanto: d-ro Leopold Dreher kaj prof. Tadeusz Hodakowski, Krakova SAT-delegito Albin Piotrkowski, Esperanto-Lektorato en Jagelona Universitato, Pola Esperanto-Instituto en Krakovo, redakcio de la revuo "Pola Esperantisto", redakcio de la revuo "Juna Esperantisto", Pollanda Esperanto-Delegitaro (PED), Krakova Societo Esperanto, Studenta (Akademia) Esperanto-Rondo ĉe Jagelona Universitato.

Post la Dua Mondmilito en Krakovo, la 15-an de marto 1945 renkontiĝis kelkpersona grupo de Krakovaj esperantistoj: nove alvenintaj Krakovon kaj veteranoj de la Krakova E-movado, kaj ili decidis proklami la novan Esperantan organizaĵo: Asocio de Esperantistoj en Pollando (AEP). La 17-an de oktobro 1945 oni oficialigis laŭleĝe la AEP, kiel la unusolan postmilita E-asocion, funkciantan tutlande, posedantan sian provizoran sidejon en Krakovo. Ĝia prezidanto estis Józef Alfus.

Inter 1948 kaj 1955 pro la politikaj kaŭzoj oni malpermesis daŭran funkciadon de la esperantista movado en Krakovo. Nur en Jagelona Universitato prof. Mieczysław Sygnarski kontinuis la E-lektoraton.

# *Historio de Esperanto-movado en Krakovo*

En septembro 1958 oni kreis Polan Esperanto-Asocion kaj samtempe ĝian Krakovan Filion; ĝia unua prezidanto estis Stefan Dziwlik.

En majo 1960 estis fondita Esperanta Koruso Orion sub gvidado de Leopold Brichta, kiu funkciis ĉe la Krakova Filio de Pola Esperanto-Asocio.

En 1962, kadre de la Krakova Filio de PEA funkciis jenaj fakaj sekcioj: sekcio de arkitekturistoj, sekcio de Esperanto-instruistoj, sekcio de Esperanta Junularo, sekcio de ĵurnalistoj, sekcio de kuracistoj, Turisma Sekcio.

Krom tio Esperantistoj-katolikoj funkciis enkadre de la Pola Sekcio de IKUE, ekster la strukturoj de Krakova Filio de PEA. La krakovaj esperantistoj laboristoj funkciis en siaj lokaj medioj, ekz. Esperantistoj-fervojistoj, tramistoj – multaj el ili estis membroj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

En 1966 funkciis la jenaj fakaj laborsekcioj en Krakova Filio de PEA: Instruista Sekcio, Kuracista Sekcio, Junulara Sekcio de Pola E-Junularo, Turisma Sekcio, Ĵurnalista Sekcio, Sekcio de Arkitektoj, Soci-kultura Sekcio.

En aprilo 1967 estis fondita Filatela Interesiĝklubo Esperanto, funkcia ĉe la Regiona Filatela Asocio, sub protektado de Krakova Filio de PEA kaj Regiona Asocio de Filatelistoj. Ĝia prezidanto estis elektita Marian Kostecki. La Klubo funkciis en la skalo tutlanda kaj eĉ internacia.

En septembro 1970 oni fondis la novan interesocian organizaĵon – Tutpollanda Interesiĝ-Klubo Esperanto, kies prezidanto estis elektita Marian Kostecki. La Klubo asociigis 128 membrojn el la tuta Pollando kaj 33 membrojn el eksterlando.

En marto 1971 oni decidis reorganizi la lokan esperantistan movadon, kreante Vojevodian Filion de PEA en Krakovo. Ĝia prezidanto estis elektita Stanisław Świstak.

En majo 1973 estis fondita en Krakovo la dua laŭvice, Esperanta koruso Kamea sub gvidado de Zbigniew Warmuz.

En oktobro 1979 estis fondita en Krakovo la Vojevodia Esperanto-Klubo kiel memstara organizaĵo, celanta la konstantan kunlaboron kun Vojevodia Kulturdomo kadre de ĝiaj aranĝoj (ne nur por esperantistoj). Ĝia unua prezidanto estis Stanisław Świstak, poste laŭvice Lidia Ligęza, Jadwiga Gibczyńska kaj Paulina Wójcik.

La 21-an de februaro 1984 oni kreis Krakovan Klubon de Veteranoj kaj Senjoroj-Esperantistoj, kies prezidanto estis Marian Kostecki. La kunvenoj de la Klubo okazadis ĉiun duan semajnon.

La 18-an de novembro 1986 oni fondis Polan Sekcion de Esperantistoj-Kooperativanoj sub gvidado de Eleonora Florkowska.

La 21-an de septembro 1993 estis fondita nova E-organizaĵo: Krakova Esperanto-Klubo de UNESCO, kies prezidanto estis mag. Grażyna Maszczyńska-Góra.

Fine de 1994 en Krakovo funkciis jenaj E-organizaĵoj kaj grupoj: Esperanto-Klubo de UNESCO (prez. mag. Grażyna Maszczyńska-Góra), Krakova Klubo de Veteranoj kaj Senjoroj-Esperantistoj (prez. Marian Kostecki), Placówki Esperanckiej Pracy Społecznej (PEPS) sub gvidado de Zbigniew Warmuz (prezidanto de E-Koruso Kamea), Grupo de Esperantistoj-Kooperativanoj sub gvidado de mag. Zuzanna Ćwiklińska, Grupo de Esperantistoj-Katolikoj sub gvidado de Maria Towpasz, Esperanto Medicina-Centro "Shinoda Kuracejo" sub gvidado de d-ro Włodzimierz Opoka.

Fine de decembro 1994 ĉesis sian organizan funkciadon Krakova Filio de PEA kaj depost la 1-a de januaro 1995 refondiĝis en Krakovo – Krakova Societo-Esperanto sub

# *Historio de Esperanto-movado en Krakovo*

gvidado de Danuta Rymar.

En januaro 1997 oni dissendis leteron al esperantistoj kaj Esperantaj kluboj kaj organizoj informante ilin pri organizado de la pola sekcio de ILEI. Tiam ILEI en Pollando funkciis ĉe la krakova Esperanta Klubo de UNESCO. La iniciatinto de la organizado de ILEI en Pollando estis mag. Maria Majerczak. Ŝi estis dum dek jaroj la prezidantino de la Pola Sekcio de ILEI. Vic-prezidantino – mag. Lidia Ligza, sekretario – mag. Grażyna Maszczyńska-Góra, kasistino – mag. Magdalena Tatara. En 2001 mag. Lidia Ligza rezignis pri sia funkcio de vic-prezidantino de la Pola Sekcio de ILEI pro aliaj Esperantaj devoj. Inter 1999-2005 la funkcion de sekretario plenumis mag. Mirosława Kubicka, ekde 2005 sekretario estis mag. Piotr Nosek. Nuna estraro estas: prezidanto – mag. Piotr Nosek, kasistino – mag. Magdalena Tatara, sekretario – Małgorzata Jolanta Komarnicka.

En majo 2005 Maria Majerczak kreis Internacian Centron de la Kulturoj. Dum sia 4-jara ekzisto ĝi organizis por la vasta pola publiko pli ol 30 E-aranĝojn, inter ili 17 koncertojn de E-muziko. La aranĝojn ĉeestis entute kelkaj miloj da personoj. La Esperantlingvaj programoj, aranĝitaj laŭ difinitaj reguloj, okazadis en kulturcentroj, lernejoj kaj dum publikaj aranĝoj de Sudpollando. Ili celis plejparte neesperantan publikon kaj estis interpretataj en la pola lingvo.

## **Krakovaj E-aranĝoj**

La unua festivala aranĝo promocianta Esperanton estis la Unua Esperanto-Semajno, sub la ĉefgvidado de prof. d-ro Odo Bujwid, d-ro Leon Dreher kaj prof. Tadeusz Hodakowski. Tiu ĉi kultura aranĝo okazis inter la 16-22-a de oktobro 1933 en la kineja salonego de Krakova Industria Muzeo ĉe la strato Smoleńsk 9.

La dua laŭvice festivalo de Esperanta kulturo okazis postmilito, la 30-an de oktobro – 2-an de decembro 1979, nome OPERA'79 – Ogólnopolski Przegląd Esperanckiego Ruchu Artystycznego (Tutpollanda Trarigardo de Esperanta Artista Movado), kies Organizan Komitaton sub gvido de Stanisław Świstak eniris i.a. mag. Lidia Ligza, Jadwiga Gibczyńska, d-ro Leszek Kordylewski, Marcin Miłkowski. Ĝi okazis en la sidejo de la pupteatro “Grotoska” ĉe la strato Skarbowa 2, dume prezentiĝis entute 11 esperantistaj amatoraj grupoj kaj 4 individuaj partoprenantoj el la tuta Pollando. La festivalon “OPERA'79” partoprenis pli ol 600 personoj.

Tiamaniere naskiĝis “Esperantaj Tagoj de Krakovo” – ĉiujara aranĝo okazis jam 25-foje – sub la ĉefgvidado de Stanisław Świstak – prezidanto de Krakova Filio de PEA (1977-94), kaj sekve sub gvidado de Danuta Rymar – prezidantino de KSE (1995-96) kaj Lidia Ligza – filologo kaj prez. de KSE (depost 1997 ĝis nun).

Krakova Esperanto-Klubo de UNESCO sub gvidado de mag. Grażyna Maszczyńska-Góra – instruistino, reaktivigis la krakovajn “Festivalojn de E-kulturo”, ĉekomence en formo de t.n. “Esperanta Printempo” (1993-95), kaj sekve “Festivalo de Esperanta Kulturo” (1996-99).

En la Kulturdomo “Śródmieście” aktivas “Esperanta Sceno ARENO”, kiun fondis Jadwiga Gibczyńska, multemerita por Esperanta kulturo, kiu en 1964 iniciatis “Esperantan

# *Historio de Esperanto-movado en Krakovo*

Teatron de Unu Aktoro”, prezentante multajn monodramojn en Esperanto dum porokazaj solenaĵoj en kaj ekster Krakovo, dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto (1964-1999). La sperktakloj de “ARENO” okazas la unuan lundon monate je la 18-a horo.

## **Tutpollandaj E-aranĝoj en Krakovo**

La 30-an kaj 31-an de oktobro 1926 okazis en Krakovo la tutpollanda konferenco, kiu estis aranĝita por prikonsideri la aktualajn bezonojn de pola E-movado kaj por krei la novan unuiĝon sub la nomo Pollanda Esperanto-Delegitaro (PED), kiun partoprenis entute 110 esperantistoj el 33 polaj urboj. Ĝies prezidanto estis elektita prof. d-ro Odo Bujwid.

Inter la 17-a kaj-28-a de majo 1928 okazis en Krakovo la 2-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto.

La 31-an de majo kaj la 1-an de junio 1936 okazis la 7-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto, kies ĉefa temo estis: "La 50-jara jubileo de Esperanto".

La 18-an kaj 19-an de junio 1938 okazis la 8-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto.

La 20-an kaj 21-an de septembro 1959 okazis en Krakovo la 15-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto; partoprenis ĝin entute ĉirkaŭ 600 personoj el Pollando kaj eksterlando.

Iner la 3-a kaj-5-a de januaro 1969 okazis la 5-a Tutpollanda Jubilea Kunveno de Pola Esperanto-Junularo (PEJ), festanta sian 10-jaran jubileon (1959-69).

La 22-an kaj 23 de aprilo 1975 okazis en Krakovo plena kunveno de la Ĉefa Estraro de PEA kun ĉeesto de krakova aktivularo por prikonsideri la aktualan organizan staton de pola E-movado. Dum la kunveno oni distingis 40 meritplenajn esperantistojn per la ora "Honora Insigno de PEA – Meritplena Esperantisto".

De la 23-a ĝis la 30-an de aŭgusto 1986 okazis la 24-a Tutpollanda Kongreso de Esperanto, lige al la 80-jara jubileo de Esperanto en la krakova medio.

Inter 1997 kaj 2001 kaj en 2004-2005, ĉiam en aprilo, okazis Esperantologia – Didaktika Konferenco de la Pola Sekcio de ILEI – entute 7 konferencoj.

Dum ĉiuj Jarkonferencoj okazis prelegoj kaj diskutoj pri metodikaj kaj lingvaj aspektoj de E-instruado, ekzemplaj E-lecionoj, spektakloj kaj ekskursoj. En aprilo 2000 okazis samtempe la jarkonferenco de Pola Sekcio de ILEI kaj la 1-a Intrenacia Renkontiĝo de Interkulturo-Klasoj.

Inter la 18-a kaj 23-a de aprilo 1998 okazis la 2-a Esperantologia Sesio de Akademio Internacia San Marino (AIS) organizita de mag. Lidia Ligęza. Partoprenis ĝin esperantistoj el urboj: Bydgoszcz, Gliwice, Kraków, Krzeszowice, Jelenia Góra, k.a.

De la 28-a de aprilo ĝis la 3-an de majo 2000 okazis la 30-a Tutpollanda Jubilea Kongreso de Esperanto en la "Jubilea Jaro 2000", kiun kunaranĝis: Pola Esperanto-Asocio (Gliwice), E-Klubo de UNESCO (Krakovo) kaj Krakova Societo Esperanto. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 100 personoj el Pollando kaj kelkaj eksterlandanoj.

## **Internaciaj E-aranĝoj en Krakovo**

Inter la 11-18-an de aŭgusto 1912 okazis en Krakovo la 8-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto – unuan fojon sur polaj teritorioj – kiel grava solenaĵo de la tutmonda esperantistaro, kiun partoprenis d-ro L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. La kongerson

# ***Historio de Esperanto-movado en Krakovo***

ĉeestis 1000 kongresanoj el la tuta mondo, krom multnombro alvenintaj invititaj gastoj, oficialuloj kaj ĵurnalistoj.

De la 20-a ĝis la 31-a de julio 1931 en Krakovo okazis la 3-a Internacia Pedagogia Kurso de Esperanto sub gvidado de pastro Andreo Cseh. La kurson partoprenis entute 161 personoj el Pollando kaj eksterlando.

Inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 1931 en Krakovo okazis la 23-a Universala Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis 850 personoj el 32 landoj. La altan protektadon al la Kongreso plenumis prof. Ignacy Mościcki – prezidento de Pollando kaj la marŝalo Józef Piłsudski – la ĉefestro de la pola militistaro.

De la 9-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1959 en Krakovo okazis Jubilea Postkongreso – post la 44-a UK de Esperanto okazinta pli frue en Varsovio. Partoprenis ĝin pli ol 400 esperantistoj kaj multaj invititaj gastoj kaj ĵurnalistoj.

En Krakovo okazis kvarfoje Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco (IMEK), kiun organizis Pola Sekcio de Universala Medicinista Esperanto-Asocio (UMEA). La unuan fojon IMEK okazis la inter la 13-a kaj 17-a de julio 1977. Sekve okazis: la 6-a IMEK – inter la 19-a kaj 24-a de julio 1987, la 11-a IMEK – de la 4-a ĝis la 8-a de julio 1997. La 16-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso okazis inter la 13-a kaj 18-a de julio 2008, okaze de la 100-jara jubileo de UMEA. La prezidanto de la Organiza Komitato estis d-ro Włodzimierz Opoka – Ĝenerala Sekretario de UMEA.

De la 17-a ĝis la 24-a de julio 1987 okazis en Krakovo la 43-a Internacia Kongreso de la Tutmonda Esperanto-Junularo (TEJO) en la sidejo de Krakova Minej-Fandindustria Akademio. La Kongreson partoprenis entute 1120 personoj el 47 landoj. La Kongreso okazis lige al la 100-jara jubileo de Esperanto (1887-1987).

Inter la 24-a kaj 29-an de majo 1997 okazis la 12-a Pola Sesio de Akademio Internacia de San Marino (AIS) en la sidejo de Jagelona Universitato. La Sesion partoprenis ĉirkaŭ 60 personoj el Aŭstrio, Germanio, Rumanio, Pollando kaj San Marino.

## **Instruado de Esperanto en Krakovo**

Inter la unuaj kaj meritplenaj instruistoj-esperantistoj antaŭ la unua mondmilito necesas menci la nomojn de: prof. Tadeusz Biliński – la unua lekcianto de Esperanto en la krakova medio, prof. d-ro Odo Bujwid - de Jagelona Universitato, Juliusz Kriss, d-ro Leopold Kronenberg kaj d-ro Jan Mędrkiewicz – de universitata medio, Jan Kaszycki – dir. de Reala Lernejo, inĝ. Edward Kostecki – direktoro de la Industri-Teknika Lernejo, prof. Bronisław Kuhl kaj prof. Franciszek Skalski – eminentaj pedagogoj de Krakova Komerca Akademio, krome aliaj lekciantoj de Esperanto. Ili ĉiuj aktivis ankaŭ kiel fervoraj, sinoferemaj promociantoj kaj ŝatataj prelegantoj en la krakova medio kaj en la suda regiono.

Dum la intermilitaj jaroj 1919-1939, krom la supre menciitaj pedagogoj, aktivis la novaj adeptoj de Esperanto: prof. d-ro Witold Wilkosz – dir. de Matematika Instituto en Jagelona Universitato, prof. d-ro Adam Wrzosek – antropologo, historiisto pri medicino. Apartan atenton meritas prof. Tadeusz Hodakowski – la unua lektoro de Esperanto en Jagelona Universitato dum la jaroj 1930-39. En la krakova medio aktivis sukcesplene d-ro Leopold Dreher (pseŭdonimo Leo Turno) – advokato, fervora esperantisto, lekcianto kaj preleganto, aŭtoro de propra E-lernolibro kaj vortaro, kursgvidanto por plenkreskuloj, aktiva membro de la Konstanta Ekzamena Komisiono, kadre de Esperanto Instituto.



# *Historio de Esperanto-movado en Krakovo*

Sekve, de la jaro 1945, daŭre aktivis prof. Mieczysław Sygnarski – la dua lektoro de Esperanto en Jagelona Universitato (1946-1979). Li ankaŭ gvidis E-kursojn en aliaj krakovaj altlernejoj (nuntempe – Univeresitatoj): Pedagogia, Agrokultura kaj en Minej-Fandindustria Akademio, en kelkaj mezlernejoj kaj en Vojevodia Kulturdomo.

Post la forpaso de prof. Sygnarski, en la universitata medio instruis Esperanton dum la jaroj 1975-89 laŭvice: d-ro Leszek Kordylewski, mag. Lidia Ligeża kaj d-ro Adam Łomnicki. Ekde 1995 ĝis nun E-lektoraton en Jagelona Universitato gvidas mag. Maria Majerczak, kiu ankaŭ instruis Esperanton en la Supera Lernejo de Bankismo kaj Direktado (WSZiB). Samtempe ŝi gvidas la Studentan Sciencan E-Rondon ĉe Jagelona Universitato.

Esperanto-kursoj okazadis kaj okazadas ankaŭ en aliaj krakovaj altlernejoj: Medicina Akademio, Krakova Politekniko, Krakova Ekonomia Akademio, en kelkaj krakovaj ĝeneralklerigaj mezlernejoj, en diversaj laborlokoj kaj en kulturdomoj.

## **La teksto estas bazita sur jenaj fontoj:**

István Szerdahelyi jam en la 60-aj jaroj pripensis la problemojn de la lernofaciliga valoro de Esperanto. Tion li faris en teoria kadro kaj specife rilate al la problemoj de hungarlingvanoj, kiuj devis lerni hindeŭropan lingvon (en tiu momento temis ĉefe pri la rusa, aŭ germana). Temis pri teoriaj pripensoj surbaze de la lernomaterialo en la unua lerno-jaro de fremdaj lingvoj. Li simple komparis la materialon troveblan en la lernolibroj.

Helmar Frank estis la gvidanto de grandskalaj projektoj por science esplori kaj mezuri la lernfaciligajn valorojn de Esperanto. Oni devas agnoski, ke en la lasta parto de la pasinta jarcento, ĉio ligita al ĉi tiu temo estas ankaŭ rekte aŭ nerekte ligita al Frank. Aliflanke la eksperimentoj de Frank, laŭdire bazitaj sur la antaŭaj ideoj de Szerdahelyi, fakte portis al iu ĝeneraligo de la prudentaj konstatoj de Szerdahelyi pri la lernofaciliga valoro de Esperanto. La plej granda eksperimento en germanaj publikaj lernenoj gvidata de Frank provis mezuri la efikon ĉe germanlingvaj infanoj por posta lernado de la angla (kiu intertempe iĝis la granda lingvo lerninda en Okcidenta Eŭropo). Oni vidas, ke la ideo de Szerdahelyi pri helpo por lernado de hindeŭropaj lingvoj fare de nehindeŭropanoj malaperis. Frank, aliflanke, trovis multajn pozitivajn rezultojn, kiuj verŝajne nur parte estas science pravigeblaj, sed parte dependas de aliaj faktoroj (motivigo pro partopreno en eksperimento, ekzemple, aŭ ĝenerala kuraĝigo pro bonaj rezultoj pri lernado de fremda lingvo). La rezultoj de Frank estis ankoraŭ pli ĝeneraligitaj en la Esperanto-movado tiel, ke Esperanto iĝis lernfaciliga en ĉiuj situacioj sendepende de la ekira lingvo aŭ de la cel-lingvo. Evidente ni parolas ĉi tie pri la lernfaciliga valoro de ĉiu lingvo: se oni lernas duan lingvon, la lernado de la tria estos pli facila. Evidente Esperanto konservas sian apartan lernfacilecon, kaj tio metas ĝin super aliajn lingvojn, kiam temas pri lerno-rezultoj.

Post Frank oni daŭre aplikis tiun esplor-modelon, sed pluraj komencis havi dubojn pri la pure lingvaj lernfaciligaj efikoj de Esperanto, kaj laŭgrade oni komencis esplori la efikojn de la lernado de Esperanto al la ĝenerala kompreno pri la funkciado de lingvoj, al la tiel nomataj prilingvaj kapabloj (metalingvaj kapabloj, laŭ la greka dialekto de Esperanto). Oni devas konsideri ke intertempe en eŭropaj lernejoj, pli en iuj landoj kaj malpli en aliaj landoj, oni ne instruas teoriajn konceptojn pri gramatiko same intense kiel oni faris antaŭ 50 jaroj, tiel ke infanoj apenaŭ komprenas la malsamecon inter, ekzemple, adjektivoj kaj substantivoj. Springboard estas la nuna projekto en Britujo, kiu provas mezuri la efikojn de instruado de Esperanto al malgrandaj infanoj. Ĝiaj ideoj ŝuldoj al Szerdahelyi kaj Frank estos ekzamenataj kaj ankaŭ oni parolos pri la malsameco inter ĝiaj celoj kaj la “klasikaj” eksperimentoj pri lernfaciliga valoro de Esperanto. Fakte Springboard koncentriĝas je la efiko de Esperanto al la prilingvaj kapabloj de la infanoj. Ĝi ankaŭ ekzamenas la rezultojn de la “entuziasmiĝo” pro lernado de Esperanto.

## Simpoziaj prelegoj

Kiel oni vidas, ni iris longan vojon de Szerdahelyi (kiel hungara infano povas lerni vortojn kaj strukturojn utilajn por poste lerni la germanan) al Springboard (kiel infano povas kompreni la distingon inter substantivo kaj adjektivo kaj povas akiri ĝenerale bonan senton pri fremdaj lingvoj).



**Renato Corsetti**

Okupiĝis unue pri esploroj pri infana dulingveco en la Fakultato pri Psihologio de la Universitato “La Sapienza” en Romo. De la universitata jaro 1991-92 ricevis instru-taskojn pri la temoj: Observado de la Infana Konduto, Laboratorio pri Lingvo kaj Komunikado, Psiholingvistiko, kaj fine instruis kiel profesoro pri Psihopedagogio de Lingvo kaj Komunikado. De 1992 ĝis 2000 kunlaboris en la Eŭropa Kunlabor-Projekto por modelo de instruado de fremdaj aŭ duaj lingvoj al infanoj. Verkis en Esperanto kaj en la itala pri Esperanto kaj pri socilingvistikaj kaj psiholingvistikaj temoj. Eksprezidanto de UEA, sekretario de la Akademio de Esperanto.

---

### Jurek Żabowski

## La postdiplomaj studoj kiel formo de la senĉesa klerigado (surbaze de la Altlernejo Paweł Włodkowic en Płock)

La unuaj jaroj de la XXI-a jarcento antaŭdiradis grandan bezonon de la instruistaj medioj pri kompletigado de la profesiaj kvalifikaĵoj, akiritaj en altlernejoj klerigantaj instruistojn. La planitaj reformoj de edukado postulis plurajn instruistojn pretaj por realigado de novaj taskoj, precipe por instruado de diversaj lernobjektoj. La dokumento enkondukanta ĉi-reformon, datita la 15-an de februaro 1999 ŝanĝas principe la rolon kaj pozicion de la instruisto en lernejo. La instruisto ne respondecos nur pri realigado de la propra instruobjekto kaj eventuale pri la eduka laboro en klaso, por kiu li estas edukisto. La reformo devigas instruiston respondi pri harmonia, tuteca, kompleksa progreso de ĉiu lernanto, sendepende de la lernobjekto. Krome, ĝi postulas de li krear aktivecon, memstarecon, scipovon decidi kaj organizi la laboron de lernantoj, kiu certigos iliajn aktivecon kaj memstarecon dum akirado de scioj. Jam ĉi tiuj supre menciitaj kondiĉoj de la instruista laboro en la reformata lernejo sufiĉe motivas serĉadon de novaj formoj de la klerigado de instruistoj kaj perfektigadon de

## Simpoziaj prelegoj

---

instruistoj jam laborantaj. La neŝtata Altlernejo Włodkowic en Płock, relative nova, kvankam unu el la plej malnovaj kaj plej grandaj (ekestis en 1992) de la komenco de sia agado aktive reagis al bezonoj ne nur de la loka socio.

Kiel komencajn kondiĉojn de la studoj oni akceptis, ke ili ne estu limigitaj nur al la strikte esence-didaktika pretigo de instruistoj al instruado de matematiko. Temis pri tio, ke la studoj certigu ankaŭ pli profundan psikopedagogian scion, kaj stimulu la disvolviĝon de la ĝenerala kulturo de aŭskultantoj (muziko, teatro, arto). En estonteco oni premisis la establodon de similaj studoj por instruistoj de aliaj lernobjektoj. En la perspektivaj planoj de la Altlernejo Włodkowic pri la postdiplomaj studoj oni premisis de komenco ilian disvolviĝon en du kampoj. Temis pri la eliro el la rondo de personoj ligitaj kun la instruista fako kaj pri direkto de la eduka oferto al diversaj fakaj grupoj laŭ la aperantaj sociaj bezonoj. Ĝis nun oni povis elekti inter pli ol 60 diversaj tipoj de postdiplomaj studoj. Eblas ankaŭ fondo de studoj ligitaj kun la lingvo internacia esperanto.



**Jurek Żabowski**

Diplomito de matematikaj studoj en Krakova Pedagogia Universitato, doktoro de matematikaj sciencoj (1978), docento en la Altlernejo Włodkowic en Płock, tie ĉi – vicrektoro (ĝis 2006), nun – direktoro de la Postdiplomaj Studoj. En la sfero de scienca laboro interesiĝas pri problemoj de senĉesa klerigado. Aŭtoro de dekelkaj lernolibroj kaj sciencaj artikoloj pri matematiko, scienca redaktoro de libroj pri matematiko. Konas la lingvon internacian Esperanton kaj agas por ties disvastigado.

---

**Adam Łomnicki**

### **Diversaj formoj de aktivigado de lernantoj dum Esperanto-lecionoj**

Dum jarcentoj gepatroj instruis siajn infanojn sen strikte difinitaj reguloj, junaj homoj akiradis spertojn kaj scion parolante kaj disputante kun plenkreskuloj. Ni ne forgesu tiun ĉi vojon de trankvila evoluo, precipe por transdoni niajn pensojn kaj pasion, aktivigante lernanton – unu lernanton, du aŭ tri lernantojn, kelkajn lernantojn. Tiu ĉi situacio – etnombraj

grupoj da gelernantoj – ĝis nun plej ofte ekestas dum E-lectionoj. Ĉiu E-instruisto povus priskribi interesajn ekzemplojn de aktivigado de lernantoj. Tiamaniere kreskus aro da reguloj, kiuj transformiĝus en principojn de edukado.

Multnombraj grupoj da gelernantoj kaj postulo instrui „ĉiun“, dume ŝpari la tempon kaj energion, kondukis al priskribo de „moderna“ didaktika procezo. Komprenoble tiujn ĝeneralajn principojn de edukado (kiel ekzemple: pligrandigado de malfacilaĵoj, klarbildeco, kunigado de teorio kun praktiko) oni devas adapti por E-lectionoj. Diversaj ekzemploj permesus pliprofundigi la priskribon de la didaktika procezo. Ĉu ĉiam sekvi tiujn ĝeneralajn principojn? Ĉu malfacilan ne nur por poloj „uzon de akuzativo“ enkonduki dum la lastaj lecionoj de la elementa kurso? Tiam niaj lernantoj akiros preskaŭ neniun lingvan sperton kaj restos konstantaj komencantoj. Eble pli bone estus „enkonduki akuzativon“ dum la dua, aŭ eĉ la unua leciono de la elementa kurso de esperanto? Ebla kaj taŭga estas la transpreno de la principoj subtenataj de lingvistoj kaj – tio ne estas ŝerco – de pedagogoj okupigantaj pri la instruado de matematiko (ĉar tiu ĉi branĉo de pedagogio – didaktiko de matematiko – tre rapide kaj profunde evoluis).



**Adam Łomnicki**

Diplomito de matematikaj studoj en Jagelona Universitato, doktoro de matematikaj sciencoj en sfero de ilia didaktiko (1980), ekde 1972 instruisto en Krakova Pedagogia Universitato, inter 1987-90 universitata instruisto de matematiko en Alĝerio, aŭtoro aŭ kunaŭtoro de pli ol 60 lernolibroj kaj sciencaj artikoloj, ligitaj kun la instruado de matematiko, preskaŭ denaska esperantisto, konstanta komencanto en esperantigado de pola poezio, kiel lernanto de mezlernejo, ricevis instrurajton de esperanto; gvidis E-kursojn en krakovaj mez- kaj altlernejoj, en Pamporovo kaj Smoljan en Bulgario (antaŭ 1981).

---

**Zbigniew Paweł Kruszewski**

### **Premisoj por fondo kaj funkciado de Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj en la Altlernejo Włodkowic en Płock**

La Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj estis fondita en la kunlaboro inter la Altlernejo Włodkowic en Płock kaj Pedagogia Universitato en Jaroslavl (Rusio) surbaze de la interkonsento, datita la 30-an de oktobro 2006. Tiu ĉi instituto ekestis por helpi la komprenon kaj forigon de la kulturaj barieroj, trarompi la kulturan

## ***Simpoziaj prelegoj***

diversecon kaj negativajn stereotipojn formiĝintaj dum la pasintaj homaj kontaktoj. Nuntempe en la unuiganta mondo ekestis forta bezono de interkultura komunikado. Kontaktoj inter civitanoj el la ŝtatoj strikte najbaraj kaj ankaŭ malproksimaj, kaj defioj, kiuj pro tio efektiviĝas, fariĝas ĉiam pli oftaj. Kreskas la nombro de homoj vojaĝantaj eksterlanden; multaj el ili decidas resti tie dum pli longa periodo por labori, studi, vivi. Ankaŭ la moderna tekniko donas eblecojn de facilaj kontaktoj kun la tuta mondo.

Inter la taskoj de la Instituto estas: didaktikaj, sciencaj kaj esploraj en la tereno de multkultureco, antropologio, historio, pedagogio, juro, ekonomio kaj entreprenemo. Valoras detale priskribi tiujn ĉi taskojn.



### **Zbigniew Paweł Kruszewski**

Rektoro de la Altlernejo Paweł Włodkowic en Płock d-ro habil. Zbigniew Paweł Kruszewski, prof. SWPW diplomito de la Fakultato pri Agrokulturaj Aŭtoj kaj Maŝinoj ĉe la Varsovia Politekniko, en 1982 doktoriĝis pri teknikaj sciencoj kaj en 2002 habilitiĝis pri humanismaj sciencoj; aŭtoro de kelkdek sciencaj publikaĵoj kaj gvidanto de multaj sciencaj entreprenoj komisiitaj de en- kaj eksterlandaj negocorganizajoj kaj sciencaj institutoj; prezidanto de la Scienca Societo de Płock; ekde 2007 prezidanto de la Konsilio de Sciencaj Societoj ĉe la Prezidantaro de la Pola Akademio de la Sciencoj; en 2008 ricevis la titolon de honora doktoro de la Ŝtata Pedagogia Universitato K.D. Uŝinski en Jaroslav (Rusa Federacio).

---

### **Ilona Koutny**

## **Rolo de Esperanto en la interkultura komunikado**

La interkultura komunikado havas kulturen kaj speciale lingvan flankon. Esperanto estis kreita por solvi la lingvan problemon. Kvankam ankaŭ Esperanto multe evoluis kaj elformiĝis propra kulturo, ĝi pli taŭgas por la interkultura komunikado ol la kulture ŝarĝitaj naciaj lingvoj. Por efika interkultura komunikado necesas malfermiteco por aliaj kulturoj kaj konsciiĝo pri la kulturaj diferencoj krom la kunlaboremo. La prelego analizos, kiomgrade Esperanto povas ponti inter kulturoj, kaj kiel eduki al efika interkultura komunikado per ĝi.



**Ilona Koutny**

Doktoriĝis pri lingvistiko en la Budapeŝta Eötvös-Universitato (HU), habilitiĝis ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan (PL). Post la morto de prof. Szerdahelyi en 1987, ŝi transprenis la instruadon en la Esperanto-fako de Eötvös Universitato. Nun ŝi instruas en la Hungara fako de UAM. Ŝi fondis en 1997 kaj gvidas la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn ĉe UAM, kie ŝi gvidas kursojn pri Esperanta lingvistiko kaj komunikado. Asista docento ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj (San Marino), membro de UEA, ILEI, CED kaj de la Akademio de Esperanto.

Ŝi okupiĝis pri komputila parolprilaboro; redaktis la Hungaran-Esperantan vortaron (1996 kun Szerdahelyi), la Hungaran-polan temvortaron (2000 kun koleginoj) kaj 3 temvortaretojn kun ekzercoj: Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro (2002), Lingvo kaj Komunikado (2003), Homa vivo kaj Loĝado (2005), krome la Germanan-Esperantan-Polan version de Lingvo kaj Komunikado en 2008.

---

### Michael Farris

## Ĉu vere ekzistas Esperanta kulturo?

Ofta kritiko al Esperanto kiel internacia pontlingvo estas la supozata manko de kulturo, kiu malriĉigas la komunikan procezon. Malfacile estas kontraŭi tiun opinion, ĉar fakte Esperanto ne estas ĉiutaga lingvo de komunumo kiu loĝas kune. Kroma problemo estas malklareco de la nocio 'kulturo'. En ĉi tiu referaĵo estos prezento de la teorio pri kulturo de Geert Hofstede, kiu enhavas klaran difinon de kulturo kaj simplan metodon por diagnozi ĝian ekziston. En lia modelo, grupo kiu havas komunajn simbolojn, heroojn kaj ritojn, verŝajne havas komunajn valorojn, kaj tiuj valoroj estas la kerno de kulturo. Estas certe, ke inter esperantistoj ekzistas komunaj simboloj, herooj kaj ritoj. Sed ne estas klara, ĉu ili havas komunajn valorojn. La aŭtoro priskribos eblan espoloron, kiu povas respondi al tiu demando. Ankaŭ estos priskribo de la rilatoj inter individuo kaj kulturo.



## Simpoziaj prelegoj



**Michael Farris**

Naskiĝis en Usono, sed jam de pli ol 15 jaroj li loĝas en Poznań, Pollando. Li laboras en la Instituto de Lingvistiko de la Universitato Adam Mickiewicz. Li instruas, interalie, la anglan, lingvistikan metodologion, gestlingvan lingvistikon kaj tradukon. Li gvidas kursojn pri ĝenerala lingvistiko kadre de la Interlingvistikaj Studoj.

---

**Maria Janiszewska**

### Psikoaktivaj metodoj en la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj

La prelego estos dediĉita tute al prezento de NLP (neŭrolingvistika programado) kaj al eblecoj de ĝia uzo en instruado kaj lernado. NLP estas unika metodo realigi celojn, kiu proponas i.a. utiligi spacon, movon, koloron kaj la proprecojn de la bazaj sensaj sistemoj de la homo. Ĝi ankaŭ montras, kiel kreiĝas kaj funkcias niaj individuaj perceptaj filtriloj kaj pensaj modeloj, kaj kiel eblas utiligi tion en lernado. Objekto de interesiĝo de tiu metodo estas ankaŭ bildigaj teknikoj kaj metodoj pliprofundigi la memkonscion kaj plilarĝigi sian propran psikan komforton.



**Maria Janiszewska**

Dekano de la Sociologia Fakultato. Doktoro de pedagogio, universitata instruistino kun 30-jara profesia laborperiodo, realigata i.a. en AGH, Fakultato de Aplikataj Sociaj Sciencoj kaj en WSZiB. Ŝia scienca atingaĵo inkluzivas ĉirkaŭ 20 gravajn publikaĵojn.



Leszek Piekut

## Renovigeblaj fontoj de energio - ŝanco kaj defio

Turnopunkto en intenseco de ekspluatado de naturaj provizoj sekvis en la XIXa jarcento kune kun forta plirapidiĝo de evoluo de tekniko kaj signifa pligrandiĝo de nombro de loĝantaro de la Tero. Komence energion liveradis natura medio en formo de naturaj stokoj de netransformitaj brulmaterialoj kiel ekzemple ligno, karbo, lignito, petrolo aŭ gaso. Konsidere al kreskanta minaco ligita kun ŝanĝoj de klimato oni devas strebi al eble plej vasta aŭ eĉ universala aplikado de renovigeblaj fontoj de energio. Sub nomo “energio originanta el renovigeblaj fontoj” oni komprenas energion de vento, sunradiado, movo de akvo en maroj kaj riveroj, varmegan akvon el eno de tero kaj energion de biogaso, kiu estas akirata el biologiaj substancoj en procezoj de iliaj brulado aŭ putrado.

Nuntempe en Pollando energio originanta el renovigeblaj fontoj estas akirata en malgranda grado. Ĝia partopreno en la tuta eluzo de energio estas ĉirkaŭ 4,5 %. Biomaso estas la plej malnova kaj nuntempe la plej vaste profitiga renovigebla fonto de energio. Laŭ la difino de Eŭropa Unio sub la nocio biomaso oni komprenas facile malkomponiĝantajn produktojn, rekrementojn kaj forfalaĵojn de agrikultura (i.a. forsta) industrio kaj ankaŭ biologie malkomponeblajn rekrementojn industriajn kaj komunumajn. Por produkti biomason oni intence kultivas plantojn, kiuj rapide kaj forte kreskas kaj ne postulas fekundan grundon. En Usono oni planas en la jaro 2010 atingi triobligon de eluzado de biomaso kaj en 2020 pli ol 10-obligon de la uzo de bioenergio. La analizo farita de United Nations Conference on Environment and Development pritaksas, ke biomaso jam en la jaro 2050 povos esti fonto de 50 % da la tiam bezonota energio.



Leszek Piekut

Diplomito de la Altlernejo Włodkowiec en Płock. Partoprenanto de polaj kaj eksterlandaj sciencaj konferencoj. Diplomito de MBA en Varsovio. Doktoriganto en Akademio de Financoj en Varsovio. Sciencaj interesigoj: problemoj ligitaj kun utiligo de naturaj fontoj de energio.

Duncan Charters

## La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto

En Usono dum multaj jaroj la “Institute for Global Ethics” (Instituto por Tergloba Etiko) faris studojn pri tio ĉu ekzistas universalaj etikaj valoroj pri kiuj oni povas interkonsenti, kun la celo stimuli pensadon pri referencnormoj por persona, politika, kaj interkultura konduto. Tio celas interalie krei kadron de interkonsentitaj valoroj kiu rezultigos per la edukado de infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj pli pacan mondon surbaze de kompreno kaj vivado de moralaj normoj kiuj transpontas geografiajn kaj kulturojn.

Rushworth Kidder, direktoro de la Instituto, doktoriĝis pri angla literaturo kaj post kariero kiel universitata profesoro fariĝis ĵurnalisto por la usona ĵurnalo *The Christian Science Monitor*. Dum tiu tempo li raportis internacie pri mondproblemoj, kaj komencis pensi pri tio ĉu ekzistas universalaj etikaj normoj kiujn eblus instrui por ke la homaro rekonu kaj praktiku etikan konduton. Tio ebligus pli altajn normojn de persona kaj politika konduto, kaj pli paceman interagadon. D-ro Kidder kunlaboris kun fakuloj de diversaj disciplinoj, verkis plurajn librojn inkluzive la plej laste aperintan pri la moralo kaj la ekonomia krizo, kaj gvidis seminariojn por entreprenoj pri la apliko de etikaj normoj en komercaj aferoj kaj aliaj kampoj.

La prezentaĵo pritraktos la instruadon de universalaj etikaj valoroj je diversaj niveloj de la lingvoinstruado, kun aparta rilato al Esperanto kiel perilo de universalaj valoroj kiuj ebligu transpontadon de landoj, kulturoj kaj religioj por pli paca kunvivado en la terglobo. Kiel oni ebligu al lernantoj difini siajn valorojn individue kaj kolektive? Kiel tio helpas plifokusigi klason kiel kunlaborantan, reciproke sinestimantan grupon? Kiel instrui lingvon, kulturon, kaj literaturon surbaze de komune akceptitaj valoroj sen perforto de individuaj religiaj kaj moralaj konceptoj? Kiel elekti materialojn kaj pedagogion kiuj servos kiel taŭgaj portantoj de universalaj etikaj valoroj, kaj kiel tiuj decidoj rilatas al la movado por “karakteredukado” kiu plidivastigas nuntempe en Usono? Kio estas la aparta kontribuo de Esperanto kiu ebligas pli paceman sintenon, kiam tradicia instruado de aliaj lingvoj povas ankaŭ refortigi antaŭjuĝojn pri aliaj kulturoj kaj malrespekton de diferencoj?



**Duncan Charters**

Duncan Charters magistriĝis pri la franca kaj hispana lingvoj ĉe la Universitato de Cambridge (Kemabriĝo), Anglio, kaj doktoriĝis pri la hispana lingvo kaj literaturo ĉe la Universitato de Indiana en Usono, kie li dediĉis sin ankaŭ al pedagogio de la lingvoinstruado kaj servis kiel kursgvidanto de la unua semestro de hispana lingvo kaj intensiva somerprogramo. Li poste instruis en diversaj programoj ĉe la Lernejo por Internacia Trejnado (School for International Training of the Experiment in International Living, nun World Learning en Vermont), la Ŝtata Universitato de San-Francisko (SFSU-NASK) kie li instruis ĉiujn nivelojn de Esperanto inkluzive pedagogion, Wabash College, kaj California State University Humboldt. Li ekde 1974 instruas ĉe Principia College, Ilinojso, la hispanan lingvon, kulturon kaj literaturon, gvidas programon por rajtigo de lingvoinstruistoj instruante pedagogion de la lingvoakirado, kaj gvidas lingvocentron kaj kursojn pri aliaj lingvoj inkluzive Esperanton laŭ intereso kaj la bezono de studentaj programoj okazantaj eksterlande. Li servis kiel prezidanto de ILEI kaj de la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA/ILEI.

---

### Maciej Klakla

## Diversaj formoj de aktivigado de lernantoj dum didaktika procezo

Precizigitaj dum jarcentoj ĝeneralaj principoj de edukado (kiel ekzemple: pligrandigado de malfacilaĵoj, kunigado de teorio kun praktiko, ĉu scienceco) plenumas fundamentan rolon ankaŭ nuntempe kaj malgraŭ provoj de ties modifoj aŭ kompletigoj, formas nekontesteblan elirpunkton dum efektivigado de la diversaj konceptoj de edukado. Tio koncernas ankaŭ la instruadon de matematiko. En tiu sfero de la instruado tamen unu el tiuj principoj, nome la principo de la koscia kaj aktiva agado de lernanto en la procezo de instruado, plenumas specialan rolon, donante al lernanto pozicion de la subjekto dum diversaj didaktikaj penadoj. Anna Zofia Krygowska igis tiun ĉi principon la ĉefa, la plej grava en la instruado de matematiko. Aplikado de tiu ĉi principo emfazas la rolon de la instruisto-organizanto

## Simpoziaj prelegoj

de la procezo de lernado. Direktado de tiu ĉi procezo postulas konon de sinsekvo de lernadprocezoj kun profunda kompreno de karakterizaĵoj de la lernobjekto kaj de la celoj de ties instruado. Unu el la efikaj formoj de la akitivigado de lernantoj dum la procezo de lernado estas t.n. “metodo de ekspertoj”, permesanta realigi karakterizajn celojn de instruado, paralele kun la stimulado de sintenoj kaj intelektaj agoj, gravaj de la vidpunkto – preparo por efika funkciado de la homo en nuntempa demokratia socio.



**Maciej Klakla**

Doktoro de matematikaj sciencoj en sfero de ilia didaktiko, doktoro habilitita de pedagogio, profesoro en Krakova Pedagogia Universitato. Instruis matematikon dum 14 jaroj en mezlernejoj, dum 30 jaroj en la Katedro de Didaktiko en Matematika Instituto de Krakova Pedagogia Universitato, 6 jarojn en Alĝerio, unu jaron en Kanado. Kontinuas sciencajn esplorojn en la tereno de didaktiko de matematiko, speciale interesiĝas pri stimulado de matematikaj aktivecoj en procezo de solvado de matematikaj taskoj, pri distingado de matematikaj kapabloj kaj ties evoluigado. Aŭtoro de pli ol 120 lernolibroj kaj sciencaj artikoloj, ligitaj kun instruado de matematiko. Amiko en laboroj por disvastigado de esperanto.

---

### Teruhiro Sasaki

## Pri nuna situacio de Esperanta edukado en Japanaj universitatoj

Ŝajnas al mi, ke Esperanto en Japanio estas instruata ne kiel unu el fremdaj lingvoj, nek kiel unu el branĉoj de lingvistiko (interlingvistiko, planlingvistiko, sociolingvistiko, Esperantologio ktp). Laŭ mia propra sperto Esperanto estas instruata kiel eventuala speciala lekcio, por ekzemplo, en la literatura fakultato de Universitato de Tokio (2007), kaj en la Tokia Teknologia Instituto (2009), sub la titolo “La mondo de Esperanto”. Kompreneble ne daŭras longe tiuj lekcioj, ĉar ili estas nur eventuale starigitaj per propra volo de potenculoj en la fakultatoj. Mi havas alian sperton de Esperanta edukado en la Universitato de Saitama. Al mi estas permesate instrui rusan kulturon kaj Eŭropan kulturon. Esperanto naskiĝis en la Rusa Imperio kaj multe da verkoj de rusa literaturo estas jam Esperantigitaj. Esperanto ankaŭ estas unu el eŭropaj lingvoj kaj jam ekzistas riĉaj rezervoj de Eŭropa klasika literaturo.

Uzante Esperanton, ni povas instrui kulturon de Rusio kaj Eŭropo. Ĉe ni dum du monatoj studentoj lernas Esperanton, kaj poste legas materialojn pri la studobjekto, komparante japanan, anglan, Esperantan kaj aliajn tekstojn. Ekde 2005 ni instruas Esperanton tiamaniere.



**Teruhiro Sasaki**

Doktoriĝis pri sociologio.  
Profesoro de la Universitato de  
Saitama, Japanio.

---

**Joanna Hawlena / Anna Urbanek**

### **Rolo de sciencaj rondoj en la procezo klerigi studentojn de ekonomikaj altlernejoj**

Ekonomikaj studoj ne povas sin apogi sole sur transdonado de teoria scio; tiu devas esti kompletigita per aspektoj praktikaj. Tia bezono estas prezentata precipe de elstaraj studentoj. Ĉi-aspekto larĝan spektron de interesiĝ-disvolvado ebligas partopreno en laboroj de scienca rondo. Oni devas priatenti kelkajn bazajn direktojn de ilia agado:

1. partopreno en scienca esplorado kaj kunlaboro kun entreprenoj de elektita sektoro,
2. akiro de praktikaj scipovoj per preparado kaj organizado de konferencoj,
3. preparado de studentoj por komenci doktoriĝajn studojn, precipe per ebligo fari publikaĵojn,
4. plilarĝigado de la interesiĝoj pere de laŭtemaj vojaĝoj.

La membroj de la Studenta Scienca Rondo de Transporto, aktivanta ĉe la Katedro de Transporto en la Ekonomika Akademio Karol Adamiecki en Katowice, okupiĝas pri ĉiuj menciitaj aspektoj de agado.

Ili estos detale prezentataj dum Forumo.

La aŭtorinoj prezentos formojn de esploradoj kiujn partoprenis studentoj, de ili organizitajn konferencojn, metodojn de financado de agado, projektojn por plilarĝigi praktikan scion, formojn de publikaĵoj kaj ricevitaĵojn premiojn.

## Simpoziaj prelegoj



**Joanna Hawlena**

Laboras kiel adjunkto en la Katedro de Transporto de la Ekonomika Akademio en Katowice. En 1994 ŝi finis Someran Lernejon de Integracio (Summer School of Integration) en Alpbach, kaj en 1996 estis stipendiulino de California State University kadre de „The Romanowski Business Education Project” en Fresno. En 1995 ŝi defendis sian doktoran disertacion titolitan „Supernaciaj transportaj sistemoj en la kondiĉoj de eŭropa integriĝo”. En la kampo de edukado ŝi estas instruistino en tagaj, eksteraj kaj suplementaj magistrastraj studoj. Ŝi estas aŭtorino de multaj libroj kaj artikoloj publikigitaj en la pola kaj angla. Por siaj atingoj en la kampo de scienca kaj didaktika laboro ŝi trifoje gajnis rektoran premion (en 1995, 1999 kaj 2007). Ŝi estas membro de la Komisiono de Transporto de la Pola Akademio de Sciencoj – Branĉo de Katowice, Pola Loĝistika Societo kaj Pola Ekonomika Societo. Nun ŝi estas prizorganto de la Studenta Transporta Scienca Rondo.



**Anna Urbanek**

Studentino de la kvara jaro de studoj pri „Internacia kaj nacia ekspedo kaj transporto”. Ŝi studas en la Fakultato de Ekonomiko de Karol Adamiecki Ekonomika Akademio en Katowice. De 2008 ŝi estas estrino de la Studenta Transporta Scienca Rondo (SKNT). Ŝi prezentas referaĵojn en multaj tutpollandaj konferencoj. Dum la 4-a Interlerneja Forumo de Junaj Loĝistikistoj, kiu okazis inter la 19-20-a de marto 2009 ŝi gajnis la unuan premion en la konkurso por la plej bona referaĵo, montrante prezentadon „Limigo de negativa influo de transporto al la medio en la aspekto de projektoj EcoTransIT kaj EcoPassenger”. Ŝi kunordigas merkatajn esplorojn gvidatajn laŭ la ordono de Pola Ekonomika Societo. Ŝi ricevas stipendion de Ekonomika Akademio por bonaj rezultatoj en lernado. Ŝi estas aŭtorino de kelkaj artikoloj en la kampo de fervoja transporto kaj la socia respondecado de firmaoj de la sektoro TSL (transporto-ekspedo-loĝistiko), publikigitaj en tutpollandaj revuoj kaj en recenzitaj postkonferencaj materialoj.

Andrzej Pisowicz


## Esperanto kiel ŝanco por la Kaŭkaza regiono?

Kaŭkaza regiono en ĉi tiu teksto havas larĝan signifon: kiel teritorio, kiu ampleksas ne nur terenojn situatajn tuj norde kaj sude de la montĉeno nomata Kaŭkazo, sed ankaŭ la tutan teritorion de tri ekssovietaj landoj: Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio. En tiu teritorio estas uzataj pluraj, ofte tute ne parencaj (do ne similaj inter si) lingvoj, kiuj apartenas al tiaj familioj kiel hindoeŭropa, tjurka kaj kvar grupoj de kaŭkaziaj lingvoj.

Hindoeŭropan familion reprezentatas i.a. lingvoj kiel: neparena proksime al iu alia la armena, apartenanta al irana subgrupo la oseta, kaj fine, kronologie la plej nova en tiu tereno, slava rusa lingvo.

Al tjurkaj lingvoj apartenas i.a. la azerbajĝana kaj la kumika. Indiĝenaj kaŭkaziaj lingvoj dispeciĝas en kvar grupojn: kartvela (al kiu apartenas la kartvela lingvo), abĥazo-adiga, naĥa (la ĉeĉena) kaj dagestana (la avara kaj la lezga). Certe ne ĉiuj lingvoj ĝuas en la Kaŭkaza regiono la saman prestiĝon. Tio dependas de diversaj faktoroj, kiel i.a. nombro de uzantoj (azerbajĝane parolas eĉ 7 milionoj de homoj), ekzisto de malnova literatura tradicio (la lingvoj armena kaj kartvela estas notataj skribe jam ekde la kvina jarcento) kaj fine – politiko-administracia rolo: komuna ĝis antaŭ nelonge alta rango de la rusa kiel la lingvo de la fortega lando Sovetunio, al kiu apartenas dum multaj jaroj la tuta regiono de Kaŭkazo.

En la nova politika situacio, kiu estiĝis post la disfaliĝo de Sovetunio en 1991, la rolo de la rusa falis. Kvankam konsekvence de tiu fakto, populareco de internacia angla lingvo kreskas en kontaktoj kun la resto de la mondo, sed dume la nivelo de la kono de tiu lingvo estas limigita al malvastaj elitoj. Lige kun tio, la kaŭkaza regiono iĝas teritorio, en kiu konforme kondukita promocio de la internacia lingvo ESPERANTO, kiel la lingvo ne ligita al politiko kaj celoj de grandaj potencoj, povus trafi al facile influebla grundo kaj alporti rimarkeblajn avantaĝojn al la loka loĝantaro.



**Prof. dr hab. Andrzej Pisowicz**

Naskita en 1940. Pola armenologo kaj iranologo. Diplomito de la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato en Krakovo. Li studis la persan, la araban, la turkan kaj dum sia stipendio en Erevano ankaŭ la armenan lingvon. Li pliprofundigis siajn spertojn en la armena kaj irana fakoj dum postdiplomaj studoj en Parizo kaj poste ankaŭ en Tehrano. Ekde 1970 laboras en la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato. En la jaroj 1976-94 estis la estro de Iranaj Studoj kaj en 1989-94 vicdirektoro de la Instituto. En 1994-95 li laboris en la Pola Ambassadejo en Tehrano kiel ataŝeo.



# Simpoziaj prelegoj

---

Li partoprenis multajn internaciajn konferencojn dediĉitajn al la armena lingvistiko, i.a. en Filadelfio (Usono), Milano, Bruselo, Erevano kaj instruis armenan dialektologion en la Universitato de Leiden, Nederlando. Aŭtoro de ĉirkaŭ 50 sciencaj publikaĵoj. Nun li instruas la kartvelan gramatikon en la Instituto de Orientaj Studoj en Jagelona Universitato.

---

Lidia Ligeza

## Pri poezio de Julia Pióro

Julia Pióro (1902-1988) Polino. Esperantistino de 1956. Poetino, filozofo. Ŝi publikigis novelojn kaj poemojn en multaj diversaj gazetoj. Plimulto da verkoj restis en presitaj hejmmaniere volumoj. Aperis: El tero kaj etero (novelaro 1964), Hieroglifo (novelaro 1979), Fenestro Kristala (noveletoj kaj poemoj, 1981). Speciale ŝi interesiĝis pri filozofio de Oriento kaj *agni joga* (jogo de fajro), do ŝiaj poemoj emanis per multkolora kaj diversforta lumo. Bildoj de la mondo en ŝia percepto memkompreneble gravas, sed antaŭ ĉio gravas meditado reflektanta netipe observatan jarsezonon, momenton de la tago aŭ nokto – en urbo aŭ sur pli vasta spaco:

Sur la spegul-asfaltoj  
kruciĝas spadoj de neonoj –  
jen aleo de lumoj  
inter sennombraj dueloj  
(*Vespero en la urbo*)

Ĉarmaj metaforoj allogas ĉiujn, kiuj ne atendas de literaturo realisman priskribon de la rigardata mondo:

velura kato-nokto  
tuŝis la fenestron  
trinkis el nevidebla pota  
fridan lakton...  
sur verda neon-radio  
streĉis nigran voston  
kaj trempis piedeton  
en nigra banujo  
(*Kolora nokto*)

Valoras pli profunden eniri en la poezian mondon de Julia Pióro, por renkonti anoniman principon de la nokto, Haronon blinde vagantan inter lumaj



kaskadoj, feiron sur ora tapiŝo. Ili helpas al ni tiun mondon kompreni kaj akcepti. Verkado de Julia Pióro ne nur pro la internacia lingvo Esperanto turnas sin al la ĝeneralhomaj valoroj. Ŝi faras tion ankaŭ pro la enkonduko en sian intiman mondon de sentoj kaj travivaĵoj – la plej valorajn principojn filozofiajn kaj etikajn de Oriento kaj Okcidento.



**Lidia Ligeza**

Polino. Filologo, diplomito de Jagelona Universitato en Krakovo. De 1975 instruisto de Esperanto en altlernejoj, dum kursoj kaj internaciaj feriadoj. De 1991 magistro pri humanismaj sciencoj kaj de 1995 docento en Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino (AIS). Lekcianto pri literaturo en la Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Prezidanto de Krakova Societo ESPERANTO. Poetino kaj tradukantino. Aŭtorino de 6 originalaj kaj 10 tradukitaj libraj publikaĵoj i.a. „Aleo aŭtuna” (poemaro, 1987), „Mia eno” (poemaro, 1996), „Limerikoj” (poemaro, 1999). Tradukis ĉirkaŭ 500 versaĵojn de elstaraj polaj nuntempaj poetoj i.a. de K. I. Gałczyński, Z. Herbert, H. Poświętowska kaj de la nobelpremiitoj Cz. Miłosz kaj W. Szymborska. En „Pola Esperantisto” aperis ŝiaj artikoloj pri verkoj de konataj polaj poetoj kaj prozistoj. Kunredaktoro de loka „Apudvistula Bulteno” kie ankaŭ aperas ŝiaj poemoj. Pollingve ŝi publikigis kelkajn disertaciojn montrantajn ligojn inter literaturo kaj folkloro.

---

### Wanda Jakubaszek

#### Nuntempa edukado kaj Esperanto

Edukado de la homo ekde ĉiam ligiĝis kun kultura transdono de generacioj en kiu scienco kaj vivsperto estis kompletigitaj per universalaj ĝeneralhomaj valoroj kaj per dialogo. Profesoro Z. Kwieciński opinias, ke en la nova realo post unuiĝo de Eŭropo "precipe grava devo de la publika edukado estas formado de kompetenteco de ĉiu individuo al la kritikema pensado kaj kreopova agado por la komuna prospero".

Nuntempa edukado konsentis defii okupiĝi pri postuloj formulitaj de la Internacia Komisiono pri Edukado de la 21-a jarcento en la raporto: "Edukado. Estas en ĝi kaŝita la vera trezoro."

## Simpoziaj prelegoj

La unua apogilo de la raporto - lerni por scii - devas ebligi al individuo komprenon de si mem kaj de la mondo kun samtempa kovinko de kontento esti "homo sapiens".


Lerni por agi - ĉi tiu apogilo el sia elirpunkto, devas prepari individuon al efika agado sur ĉiuj vivkampoj /kultura, profesia, socia/ pere de formado de tiuj ecoj, kiuj certigas al ĝi adaptadon al la novaj kondiĉoj kun la samtempa nova rilatio al si mem kaj al la ĉirkaŭanta realo.

La plej grava edukacia defio de la 21-a jarcento estas laŭvica apogilo lerni por vivi komune. Ĝi devus establi konstruaĵon por formi socian solidarecon, sintenon de aperteco kaj estimo por ĉiuj simptomoj de malsameco, toleremo kaj pluralismo.

Plena disvolvigo de la personeco postulas ŝanĝon de spiritostato de la individuo, serĉadon de vivsenco kaj respondon al la demando: Kiu mi estas? Kiu mi volas esti? Al ĉi tiu defio korespondas la lasta grava parto de la raporto, kiu montras direktojn de edukŝanĝoj de la 21-a jarcento, tio signifas - lerni por esti.

Esenco de la nova edukado estas forlasi formadon de nacia identeco kaj anstataŭi ĝin per identeco ĝeneraleŭropa.

Pensante kaj parolante pri homo ĝenerala, ŝajnas bezone rememorigi la unuan aŭtoron de la koncepto de Eŭropo kaj la mondo sen limoj - Ludovikon Zamenhof - kreinton de la internacia lingvo ESPERANTO. La 21-a jarcento havas ŝancon kontinui nefinitan verkon komencitan de esperanta socio dum la 19-a jarcento, tio estas enkonduko de esperanto, kiel deviga lingvo, en ĉiujn lernejojn de la mondo.




**Wanda Jakubaszek**

Doktoro de humanismaj sciencoj en la sfero de pedagogio. Adjunkto en la Katedro de Didaktiko en Instituto de Edukado en Krakova Pedagogia Universitato. Pli ol 20 jarojn ŝi laboras kiel pedagogo, pasante tra diversaj etapo de „pedagogia inico“, ekde kontaktoj kun t.n. problemoplena junularo ĝis laboro kun liceanoj kaj studentoj. Aŭtoro de pli ol 10 sciencaj artikoloj. Fakte interesiĝas pri moderna edukado kaj rilatoj de homo al humanismaj valoroj. Propran evoluon apogas sur vaste komprenata kulturo kaj dialogo kun aliulo. Konas lingvon internacian esperanto kaj agas por ties disvastigado.

Nina Danylyuk

## Lingvokulturemoj en esperantaj tradukoj de ukrainaj tekstoj

La prelego estas dediĉita al la leksiko kun kultura komponento (lingvokulturemoj) en E-tradukoj de ukrainaj belartaj kaj sciencpopularigaj tekstoj. Temas pri problemoj de tradukado de realaĵoj (geografiaj kaj propraj nomoj, nomoj de manĝaĵoj, trinkaĵoj, vestaĵoj, diversaj historiaĵoj k.t.p.), simboloj, specifaj gramatikaĵoj kiel parto de la ukraina mondobildo.



Nina Danylyuk

Kandidato de filologiaj sciencoj. Fininte la Kijivan Ŝtatan Universitaton, ŝi defendis sian disertacion el la fako “ukraina lingvo” kaj ricevis scian gradon. Nun ŝi estas docento de la katedro pri ukraina lingvo de Volinia Nacia Universitato Lesja Ukrainka. Ŝiaj sciencaj interesoj: etnolingvistiko, interlingvistiko, kompara lingvistiko. Ŝi estas membro de E-klubo “Arbara kanto” en urbo Lucjk, membro de UkrEA kaj UEA, estro de ukraina sekcio de ILEI.

---

Witold Stępniewski kaj Zofia Stępniewska

## Kiu lingvo por estonta Eŭropo kaj mondo ?

La nuna tempo karakterizas sin, unuaflanke, per rapida malaperado de lingvoj de etnaj minoritatoj. Lingvistoj delonge jam scias, ke miloj da mondaj lingvoj estas en serioza danĝero pere. Ĝis nun nur malgranda frakcio da lingvoj estas priskribita sufiĉe bone por konfirmi teoriojn pri universala gramatiko, pri evoluo de lingvoj kaj pri multnombraj neresponditaj demandoj el kampo de lingvistiko kaj antropologio. La evoluo kaj deveno de la hind-eŭropa lingvogrupo kaj de aliaj grupoj estas ankoraŭ intense studataj. Lingvistoj nur lastatempe iniciatis oranizitajn agadojn por savi mortantajn lingvojn. Unu el ili estas la “Rozetta Projekto” priskribita en la artikolo.

# Simpoziaj prelegoj

De alia flanko, oni observas naskiĝon de novaj etnaj lingvoj kaj kreadon de novaj planaj (konstruitaj) lingvoj proponataj kiel neŭtralaj helpaj pontolingvoj por faciligi internacian komunikadon. En la historio estis ĉirkaŭ milo da diversaj provoj krei tiajn planlingvojn. Naskiĝis interlingvistiko, nova scienca disciplino dediĉita al la problemoj de la planlingvoj.

La artikolo koncernas elektitajn lingvistikajn fenomenojn observatajn dum la du lastaj jarcentoj. Unu el ili koncernas la unikan sukcesan revivigon de la hebrea lingvo (kreita de la lingvisto Eliezer Ben-Jehuda) en turnopunkto de la du lastaj jarcentoj. Ĝis nun ne estas alia ekzemplo de la lingvo sen denaskaj parolantoj kiu fariĝus nacia kaj gepatra lingvo kun milionoj da parolantoj. Alia fenomeno rilatas al aplikado de la planlingvoj kiel ekzemple Volapuko (1879), Esperanto (1887), Ido (1908), Interlingua (1951), aŭ rapida disvastigo de la modifita indonezia lingvo (Bahasa Indonesia).

La kunteksto de la konsideroj de la aŭtoroj estas aktuala situacio de la angla, kiel plej vaste parolata lingvo en la mondo, dum milionoj da homoj opinias la mandarenan ĉinan lingvon kiel la lingvon de estonto, kaj relative malmulaj postulas esperanton pro ties avantaĝoj kiel facileco, neŭtraleco, kaj propedeŭtika valoro.

La aŭtoroj prefere starigas ol respondas la demandon pri la lingvo de la estonto. Ĉu ĝi estos la angla, la mandarena ĉina lingvo aŭ unu el la planlingvoj? Ĉu niaj nepoj havos elekton inter la ĉina kaj Esperanto?

## Witold Stępniewski

Profesoro ordinara de Politekniko Lublina, Fakultato pri Media Inĝenierado. Estro de la Katedro pri Protekto de Tersurfaco. Sciencaj gradoj kaj titoloj: magistro pri kemio en UMCS Lublin (1970); doktoro pri agrikulturaj sciencoj (1975), habilitacio en agrikulturaj sciencoj (1980), profesoro (1989). Profesia laboro: 1970-1984: Instituto de Agrofiziko de Pola Akademio de la Sciencoj (laŭvice: asistanto, adjunkto, docento kaj profesoro), 1984 ĝis nun: profesoro en Politekniko Lublina. Esplorkampo: konstruado kaj rekultivado de rubaĵdeponejoj; kinetiko de metanotrofiaj procezoj en rubaĵdeponejoj; toksigenologio de medio. Publikaĵoj: Pli ol 200 publikaĵoj i.a. la libro „Soil Aeration and its Role for Plants” (Aerumo de grundo kaj ties rolo por plantoj) CRC, FL, unu atlaso, 8 monografioj, ĉirkaŭ 100 originalnalaj sciencaj artikoloj pri grundekologio, plantfiziologio, metanotrofo, kemio kaj biokemio de grundo. Funkcioj: 1996-2002 vicdekano de la Fakultato de Konstrua kaj Sanitara Inĝenierado de Politekniko Lublina, 2002-2008 scienca virektoro de Politekniko Lublina.



## Zofia Stepniewska

Profesoro ordinara de KUL, Fakultato de Naturaj kaj Matematikaj Sciencoj, Estrino de la Katedro pri Biokemio kaj Media Kemio. Sciencaj gradoj kaj titoloj: magistro pri kemio en UMCS Lublin (1970), doktoro pri agrikulturaj sciencoj (1979), habilitacio en agrikulturaj sciencoj (1988), profesoro (1996). Profesia laboro: 1970-74 Universitato de Maria Curie Skłodowska, Katedro de Biokemio - asistantino, 1974-1999: Instituto de Agrofiziko de Pola Akademio de Sciencoj (laŭvice: asistantino, adjunkto, docento kaj profesoro), 1999 - ĝis nun; profesoro en Katolika Universitato Lublina de Johano Paŭlo II, estrino de la Katedro pri Biokemio kaj Media Kemio. Esplorkampo: redoksaj procezoj en grundo kaj akvo, kinetiko de metanotrofiuj procezoj en grundo, oksigenologio de medio. Publikaĵoj: Pli ol 130 publikaĵoj i.a. du libroj, unu atlaso, 3 monografiaj, ĉirkaŭ 70 originalalaj sciencaj artikoloj pri redoksaj procezoj en grundo, pri grundekologio, plantfiziologio, metanotrofiuj bakterioj, kemio kaj biokemio de grundo.

## ***Sponsoroj***

---

**Estraro de pola ILEI-sekcio**

**Barbara Przybysz-Wojciechowska**  
**- direktorino de la Publika Elementa Lernejo en Czajowice**

**Robert Kamiński - prezidanto de Filio de PZE Łódź**

**Leszek Piekut**

**“Grafokom” Đurđevac (Kroatio)**

**Magdalena kaj Piotr Hawlenowie**



## ***Notoj***

---